

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

*ALFABETECO  
en la  
Tria Mondo*

Alice

# Kotizoj de MONATO kaj LA JARO 1993

## Kiom?

		MONATO		LA JARO	
		surf.	aere	surf.	aere
Aŭstralio	AUD	52	61,5	8,6	12
Aŭstrio	ATS	450	515	63	87
Belgio	BEF	1250	1450	180	250
Britio	GBP	25	29	3,6	5,0
Danio	DKK	250	287	35	48
Finnlando	FIM	192	224	29	40
Francio	FRF	210	245	30	42
Germanio	DEM	64	74	9	12,5
(or.)	DEM	48	58	7,5	11
Greko	GRD	5200	6500	970	1420
Hispanio	ESP	3500	4200	630	870
Irlando	IEP	22	26	3,5	4,8
Islando	BEF	1000	1200	180	250
Israelo	NLG	55	66	10	14
Italio	ITL	52000	60000	8000	11000
Japanio	JPY	5900	6760	775	1075
Kanado	CAD	49	57	7,5	10,3
Luksemburgo	LUF	1250	1450	180	250
Nederlando	NLG	69	80	10	14
Norvegio	NOK	259	301	38	53
Nov-Zelando	NZD	66	79	11,5	16
Portugalia	PTE	4400	5300	790	1100
Sud-Afriko	BEF	980	1180	180	250
Svedio	SEK	264	306	38	53
Svislando	CHF	59	68	8	11
Tajvano	BEF	1100	1300	180	250
Usono	USD	42	49	6,25	8,75

Aliaj landoj: Petu la tarifon de la landa peranto, aŭ, se tiu ne ekzistas, de la eldonejo: **Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Telefono +32 32 34 34 00; telekopilo +32 32 33 54 33.**

**Noto:** Se vi pagas kotizon por persono en alia lando, validas la tarifo de via lando, ne tiu de la lando de la abonoto.

## Al kiu?

### Pagu al la landa kotizperanto...

**Argentina:** F-ino Marta Solis, Tucumán 50, RA-2600 Venado Tuerto (Santa Fé).

**Aŭstralia:** Libroservo de AEA, Post Office Box 230, Matraville, N.S.W. 2036. Tel. (02) 661 2246.

**Aŭstria:** Aŭstria Esperanto-Movado, Margarethengürtel 100, 1050 Wien. Banko: Die Erste, konto 000-99511.

**Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

**Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084 Brasilia.

**Brita:** Esperanto-Asocio de Britio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF (pĉk. 54 851 0008).

**Bulgara:** Press Esperanto, str. Jeko Dimitrov 80, BG-1303 Sofia.

**Dana:** Astrid Birkbak, Rugvenget 46, DK-2750 Ballerup (pĉk. 1705121 Girokontoret Høje Taastrup).

**Finna:** Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 Hyvinkää, pĉk.427 72-2.

**Francaj:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75000 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris).

• Esperanto-Klubo de Metz, 36 rue St. Marcel, 57000 Metz.

**Germanaj:** Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-W-8900 Augsburg (pĉk.: Nürnberg 650 92-858 (BLZ 760 100 85)).

• Esperanto-Centro Paderborn, Postf. 1450, Paderborn (pĉk.: Hannover 259658-301).

• Libera Esperanto-Asocio, Am Stadtpfad 11, D-W-6236 Eschborn (pĉk.: Karlsruhe 2125 01-759).

• Literatura-Servo „Espero”, Rolf Beau, Jacobstr. 9, D-O-7010 Leipzig (Deutsche Bank Leipzig konton-ro: 1195106 (BLZ 86070000)).

**Greka:** Helena Esperanto-Asocio, Agiu Melietiu 54, 11252 Ateno.

**Hispanaj:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal 7, 2º izda., Santander (pĉk.: 03548531).

• Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions, Agència 461, konto 550/53).

**Hungara:** Libroservo KFT, Pf 54, H-1426 Budapest.

**Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12.

**Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavik.

**Israela:** Faklieru Aviv, David Elazar, 3 Holon IL-58410.

**Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204).

**Japanaj:** KLEG, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Osaka-hu 561.

• Nagoja Esperanto-Centro, Tōsin Biru 204, Higasisakura 2-13-23, Nagoya-si, Higasi-ku 461, Japanio.

• Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162.

**Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, 6358 De Bordeaux, Montréal, Québec, H2G 2R8.

**Korea:** Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. kesto 4258, Seoul-100.

**Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb.

**Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12).

**Nederlanda:** Esperanto-Centrum Nederland, Riouwstraat 172, 2585 HW 's Gravenhage (pĉk.: 3583975).

**Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5.

**Nov-Zelanda:** Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1. Telefono kaj telekopilo: (4) 473-0847.

**Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. João Couto, 6, R/C.-A, P-1500 Lisboa.

**Pola:** P.W.H. Nepo, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01-865 Warszawa.

**Sud-Afrika:** Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town-8000.

**Svedaj:** Esperanto-Skolan, Barnhusgatan 8, 11123 Stockholm.

• Sveda Esperanto-Federacio, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby.

**Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schlegeldorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel.

**Tajvana:** Tajvana Esperantista Asocio, P.O. Wang Chung-yi, No 13, 2 Alley 40 Lane Chung Yung St. Shih Lin, Taipei.

**Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530.

**Venezuela:** J.E. Bachrich, Apartado 70782, 1071A Caracas.

aŭ pagu rekte al la eldonejo:  
**Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.**

- Se en via lando ekzistas poŝtĉekkonta sistemo, vi povas pagi al poŝtĉekkonto n-ro 000-0265338-43 (poŝtĉek-oficejo Bruselo, Belgio), de Flandra Esperanto-Ligo;
- Se en via lando ekzistas Eŭroĉekoj, vi povas sendi tian ĉekon. La valuto devas esti la **belga franko (BEF)** kaj dorso de la ĉeko devas troviĝi **via bankkartnumero**;
- Posedantoj de VISA-, MASTERCARD-, EUROCARD- aŭ ACCESS-kreditkarto simple sciigu per subskribita karto sian numeron kaj validodaton;



- Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon. La kontkodo de Flandra Esperanto-Ligo estas fela-x;
- Se vi havas konton en usona banko, sendu al ni ordinaran usonan bankĉekon. En tiu kazo la valuto devas esti la **usona dolaro (USD)**.

Nur se vi ne povas pagi laŭ unu el la kvin supraj vojoj, uzu la ĵonajn, kiuj tamen kostos al vi multe pli:

- Sendu al ni ordinaran bankĉekon el via lando, prefere en belga valuto. Aldonu al la sumo 225 BEF aŭ ties egvaloron plus la sumon kiun fakturos via banko. Bv. informiĝi tie. Sur la ĉeko vi skribu la nomon **Flandra Esperanto-Ligo**.
- Sendu al ni internaciajn respondkuponojn. Ili validas, se ili estas nur maldekstre stampitaj. Unu respondkupono egalas al 28 BEF.

## Anonc-tarifo

	Grandeeco mezuroj mm	prezo BEF
1/1	251 x 172	9800
3/4	188 x 172	7500
2/3	251 x 112	6700
1/2	dukolumna 188 x 112	5000
	trikolumna 124 x 172	
1/3	unukolumna 251 x 54	3400
	dukolumna 124 x 112	
1/4	unukolumna 188 x 54	2800
	trikolumna 59 x 172	
1/6	unukolumna 124 x 54	2000
	dukolumna 59 x 112	
1/12	unukolumna 59 x 54	1200

**Allaj formatoj:** 50 BEF/cm<sup>2</sup>

**Koloroj:** Por aldono de koloro, pluspago de 3000 BEF.

**Anoncetoj:** 56 mm larĝa, 1 linio 40 BEF (minimуме 6 linioj; ne eblas uzi fotojn, desegnaĵojn, emblemojn, kolorojn).

**Suplementoj:** Por aliaj paĝoj ol paĝo 2 10 % pluspago (rabatebla). Pri apartaj reklamfolioj por kunsendado aŭ alvinktado kontaktu la eldonejon. Por loĝantoj el la Eŭropa Komunumo aldoniĝos la aldonvalora imposto (AVI) de 19,5 %.

**Rabatoj:** Ĉe ripeto de la sama anonco dum du sinsekvaj numeroj 5 %, ĉe 3- ĝis 5foja aperado dum sama jaro 10 %, ĉe pli ol 5foja aperado dum sama jaro 20 %; 5foja ripeto de sama anonceto: -40 %.

# Monato

internacia magazino sendependa  
por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondo: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anonctarifo: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipso ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Andy E. Künzli, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) □ represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-raĵto ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NO-RA-F □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.




## Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Moderna vivo	10
Medio	12
Scienco	13
Ekonomio	15
Turismo	16
Lingvo	18
Libroj	22
Novelo	23
Eseo	24
Arto	25
Spirita vivo	27
Hobio	28
Enigmo	29
Humuro	30

Ĉu la knabino sur la kovrila paĝo, kiu ilustras la temon ‚alfabetigo‘ (vidu la rubrikon ‚Lingvo‘) estas leganta MONATON? Nu, ni dubas, kvankam la kvanto de legantoj bele kreskis. Post pluraj jaroj de stagnado, la leganto-nombro en 1992 altiĝis per 6 %. Tiun altiĝon ĉefe kaŭzis Usono, kie la nombro kreskis per 40 %, kaj Japanio kiu bele sekvas due kun kresko de 30 %. Sed helpis al tiu kresko ne nur landaj perantoj. Ankaŭ multaj individuoj kiuj donacis monon al la abonhelpa fonduso influis pozitive la statistikon. Danke iliajn donacojn, en 1992 multe pli da personoj ol iam antaŭe povis ĝui la magazinon, malgraŭ obstakloj kiaj ekonomia malforteco aŭ manko de transpag-eblecoj. MONATO tutkore dankas al la multaj donacintoj!

Ĉu la 14a jarkolekto, kiun MONATO nun eniras, kaŭzos similan kreskon? Vi ĉiuj povas realigi tiun revon!

La nova jarkolekto nur iom diferencas de la antaŭa. Kiel ni jam menciis, ekas ĉi-januale la rubriko ‚Medio‘ sub la redaktado de Tim Carr. Li prezentas al ni du artikolojn: unu pri arboplantado en Britio, cele al evito de plia erozio, kaj unu pri bestamado en Hispanio. Laŭ statistikoj ŝajne ne ĉiuj hispanoj kaj katalunoj estas poruloj de sangaj taŭrospektakloj kiel tiu sur la apuda foto...



„Humuro“ estas la dua rubriko kiu premieras en tiu ĉi numero. Redaktoro Seán Osborne regalias nin per unua ŝpruco da verda gajigo!

MONATO rajtas fieri pri sia 14a jarkolekto, sed malgranda frato ĝia ne malpli fieras pri la eniro en sia 11a jaro. Antaŭ precize dek jaroj startis la sonbenda versio de la magazino por blinduloj. Ankaŭ malantaŭ ĝi staras tuta skipo de volontuloj kiuj ĉiumonate helpas al ĝia realigo. Sur la foto vi vidas unu el tiuj helpantoj, Piet Damman, kies voĉon la blindaj abonantoj kutimas aŭdi. Al ĉiuj kunlaborantoj de la kaseda eldono ni deziras multe da kuraĝo por la venonta jardeko kaj al la abonantoj de la papera kaj al tiuj de la kaseda versio multe da legoplezuro!



### Dulingvaj vojmontriloj

Pli da aŭstroj asertas ne paroli la germanan kiel sian gepatran: en la plej orienta federacia lando Burgenland (270 000 loĝantoj) 19 000 parolas la kroatan (+ 400 kompare al 1981) kaj 5000 la hungaran (+ 1000). En la plej suda liglando Karintio (547 000 loĝantoj) vivas 16 000 slovenlingvanoj. Jam en 1972 oni starigis antaŭ multaj vilaĝoj dulingvajn tabulojn kun ties nomoj, sed radikalaj germanlingvanoj formetis tiujn surskribojn. Intertempe la emocioj plitrankviliĝis kaj nun ekzistas 10 lokoj kun nomtabuloj en la germana kaj slovena lingvoj. Baldaŭ oni starigos ankaŭ vojmontrilojn dulingvajn. Krom tio ekde julio 1992 en diversaj distriktoj de Karintio la slovena estas la dua oficiala lingvo.

Walter KLAG



### Koloro-kolero

Flavaj aŭtoj malpli ofte implikiĝas en akcidento ol veturiloj de iu ajn alia koloro, laŭ statistikoj lastatempe eldonitaj de brita nacia instanco pri trafiko. Evidentiĝis sama rezulto, kiam en 1975 oni unuafoje enketis. Plej karambolemaj montriĝis unualoke nigraj, dualoke blankaj aŭtoj. La esploristoj tamen atentigis, ke koloro ludas okaze de akcidento nur kroman rolon: pli gravas vetero, horo kaj lumkvalito.

PG

### Ĉernobilaj beroj

En la regiono de Gävle [Gevle], Svedio, pro la radioaktiveco post la katastrofo de Ĉernobilo ankoraŭ estas malpermesite kolekti berojn por vendi. Sed la industrio senĝene importas malmultekostajn berojn el la multe pli malpurigita Ruslando! Faras kompoton kaj vendas, sen indiki la originon de l' produkto. Dume, la altkvalitaj svedaj beroj putras en la arbaroj.

Lennart PERSSON

### Eklezia ,ino-jes'

Post multjara debato anglikanoj – membroj de la angla, ŝtata eklezio – voĉdone aprobis akcepton de virinoj kiel paroĥestrinoj. Fina decido restas nun ĉe parlamento. Tiel celas la anglikana eklezio modernigon; tamen povos esti, ke post parlamenta jeso membroj de la katolikema, kontraŭvirina alo de la anglikana eklezio formale romkatolikiĝos. Komentis konservativa paroĥestro: „La decido spegulas pli homan ol dian volon”. Ĉio ĉi, oni povas argumenti, estas nur granda frakaso en malgranda taso: nur 5 % de britoj dimanĉe vizitas anglikanan preĝejon...

Paŭlo GUBBINS

### Irlanda koalicio disfalas

En MONATO 1992/4 (p. 4) estis menciita la malfacila tasko de la nova irlanda ĉefministro Albert Reynolds [Rejnoldz], kiu heredis tiun oficon post la (politika) forpaso de la an-

taŭa registara ĉefo, akuzita pro implikiĝo en komercaj skandaloj. Fine de 1992 disfalis la koalicio estrata de Reynolds ĉar li akuzis pri malhonesteco la ĉefon de siaj koaliciaj partneroj Des O' Malley [O Malej] dum proceso enketanta plian gravan skandalon pri ŝtata asekuro de viand-eksportaĵoj, en kiu ambaŭ politikaj ĉefoj estis atestantoj.

GMA

### Rusoj forkuras el Duŝanbo

En Taĝikistano leviĝis la dua ondo de elmigrado, post tiu de februaro 1990 (vd. MONATO 1990/12, p.18), lige kun la majaj eventoj en Duŝanbo, la ĉefurbo. La problemo de forveturantaj ruslingvaj fakuloj minacas iĝi unu el la plej akraj por la respubliko. Nur dum majo de 1992 el Taĝikistano formigris pli ol 20 000 homoj, precipe el la ĉefurbo. Lige kun tio la prezoj de loĝejoj falis kvinoble. Aktuale triĉambra loĝejo kostas malpli ol 50 000 rublojn.

NikSt



Multaj partoj de l' germana fervojsistemo, konstruita antaŭ multaj jardekoj, pro la montara regiono havas eksterordinare multajn kurbojn. Tio ofte permesas rapidojn de maksimume 80km/h. Sed konstrui novajn relojn kaj liniojn kostas tro multe. La solvon alportas la trajno Pendolino (foto), kiu kapablas en kurboj kliniĝi ĝis 8 gradoj kaj atingas 160 km/h. La unua Pendolino-trajno jam trafikis inter Nurenbergo kaj Hofo kaj bezonas malpli ol unu horon, kontraste al antaŭe 80 minutoj. Intertempe germana fervojo uzas jam 20 tiajn trajnojn, kiujn konstruas germana kompanio Siemens [Simenz] kun alialandaj partneroj; la „koro"-n de Pendolino, la pendol-teknikon, inventis itala Fiat Ferroviaria.

Stefan MAUL

## Mankas veraj politikaj gvidantoj

La tradiciaj kronikoj kaj retrospektivoj de l' jaro 1992 estis plenaj de malĝoj-igaj eventoj, la komentoj havis tendencon al fatalismo. Tio ne povas mirigi, ĉar eĉ se oni revuas nur la plej elstarajn temojn de 1992, oni povus fali en hororon: militoj en preskaŭ ĉiuj mondpartoj, kun la katastrofa interci-vitana milito en eksa Jugoslavio ĉe-pinte; daŭranta disfalo de eksa Sove-tio kun sangaj interetnaj konfliktoj; ekonomiaj problemegoj en orienta Eŭ-ro-po kaj ekonomia krizo en la okci-denta hemisfero; damaĝoj de naturo kaj medio, kiuj minacas kolapsigi nian planedon; malsatmortado en grandaj partoj de Afriko; azilproblemoj kaj atencoj kontraŭ eksterlandanoj en ok-cidenta Eŭropo, precipe en Germa-nio..., ktp. ktp. Kompare al tiu ĉi terur-iga listo, la perturboj en Eŭropa Komun-umo, kiu stumblas survoje al Unio, estas preskaŭ nur bagatelo.

### Hezitemaj prognozantoj

Tradicie oni, sojle de nova jaro, ankaŭ donas perspektivon kaj prognozon pri la estonta evoluo, malpli serioze astro-logoj kaj aŭguristinoj (strange, ke tiun kvazaŭprofetan profesion hodiaŭ havas preskaŭ ekskluzive virinoj!) an-taŭdiras eventojn. Sed post la spertoj de l' pasintaj jaroj, kiam prognozojn kaj aŭgurojn ridindigis la veraj, tute surprizaj okazaĵoj, la perspektivem-uloj fariĝis tre hezitemaj. Vere ja evo-luoj estis kaj sendube estos tiom ŝao-saj, ŝarĝitaj per malcerto kaj risko, ke neblas serioze antaŭvidi ion kaj star-igi fidindan prognozon.

Kio okazis, kio okazas, ke la homaro trairas nuntempe unu el la plej mal-klaraj epokoj de l' historio? Ŝajnas, ke unu el la kaŭzoj estas nepretervidebla manko de vere gvidaj personoj en politiko kaj kulturo, mondvaste. Krom demagogoj ĉiam en historio ja estis ankaŭ klarvidaj homoj, kiuj havis tion, kion la helenoj nomis „karismo”, do ideojn pri pozitivaj perspektivoj, kiuj fascinis homojn kaj aktivigis ilin al energia kunlaborado por realigi pro-mesplenajn celojn. Se ni reiras nur al la historio post la fatala 2a mondmilito, ni rapide memoras pri diversaj nomoj, kies portantoj estis tiaj karismuloj en politiko:

### De Churchill ĝis Brandt

Jen estis ekzemple brita Winston Churchill [Ŭinstn Ĉerĉil], kiu lanĉis la ideon pri Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; jen estis usona George Marshall [Ĝorĝ Marŝl], kiu ekkonis ke detruitan

Germanion oni devas rekonstrui kaj lanĉis konceman Marshall-planon; jen estis franca Robert Schuman [Ŝuman] kaj germana Konrad Adenauer [Āden-aŭer], kiuj komprenis ke nur repaciĝo de l' tradicie malamikaj Francio kaj Germanio kondukos al progreso en Eŭropo; jen estis jugoslava Josip Broz Tito, kiu sukcesis por la unua fojo krei tut-jugoslavian ŝtaton, kaj hinda Java-harlal Nehru, kiu kun Tito vivigis la in-terblokan movadon de l' nealiancitaj landoj; jen estis franca generalo de Gaulle [Gol], usona John F. Kennedy [Ĝon Kenedi], israela Golda Meir, ĉe-ĥa Aleksandr Dubĉek, sveda Olof Pal-me, ĉilia Salvador Allende [Ajende] – por listigi nur kelkajn pliajn karismajn politikistojn, kiuj siamaniere movis ion, antaŭenigis kaj esperigis la hom-aron. Ili formortis, kiel unu el la lastaj germana Willy Brandt [Vili Brant], kiu iniciatis repaciĝon inter okcidenta kaj orienta Eŭropo.

### Taktikuloj kaj klaŭnoj


Kie hodiaŭ estas tiaj aŭ similaj figuroj? Eĉ serĉante per lupeo, oni ne trovas ilin. Jen estis eble rusa Miĥail Gorba-ĉov, sed oni rapide forpelis lin. Nun ĉie triumfas mez- kaj sub-kvalitaj fi-guroj aŭ eĉ politikaj klaŭnoj, kia la jus

elektita usona ŝtatprezidanto Bill Clinton [Klinton]. Ĉu iu el la nunaj gvidaj politikistoj havas mesaĝon, kiu povus fascini homojn, popolojn? Pri kio oni pensas aŭdante kaj legante la nomojn John Major [Mejĝa], Helmut Kohl [Kol], Milan Paniĉ? Certe ne pri iu ajn alloga kaj konvika ideo, mesa-ĝo, perspektivo. Eĉ se iuj el ili por mal-longa tempo havas iun aŭreolon, ra-pide montriĝas ke en plej bona okazo ili estas lertaj taktikuloj, kiuj scias sa-vi sian potencon; ekzemploj por tio estas franca ŝtatprezidanto Mitter-rand, pola Lech Walesa same kiel germana Kohl, la „kanceliero de l' germana unuiĝo”, kiu hazarde rikoltis historian frukton sed poste fiaskis en la tasko majstri la sekvajn problemojn. Kaj, en aliaj okazoj, mezaj kaj subaj potencaviduloj malhelpas kaj mutigas karismulojn, kiel ekzemple okazis al ĉeĥa Vaclav Havel.

### Espero pri surprizo

Kion konkludi el tiu ĉi fenomeno de manko de grandaj pensuloj, manko de freŝaj ideoj? Ĉu malesperi? Prefere ne, ĉar same surprize kiel aperis gravaj kaj parte grandiozaj ŝanĝoj dum la pasintaj tri, kvar jaroj, same surprize kiel subite estiĝis neatenditaj sangaj konfliktoj sub gvido de de-magogoj, same surprize ja povus aperi baldaŭ novaj karismuloj. Mi ne kuraĝas profeti, prognozi, aŭguri tion – sed esperi ni rajtas.

Stefan MAUL



## Kial mi neas la Eŭropan Union

Kiam la cionistoj en 1914 petis d-ron Zamenhof pri lia aliĝo, li interalie respondis: „Mi deziras labori por la tuta homaro, kaj ne por iu gento.” La celo de Eŭropa Unio (EU) estas krei pli fortan Eŭropon rilate aliajn mondpartojn. Progresi la produktadon en la riĉaj landoj je kostoj de energio kaj materialoj de malriĉaj landoj kaj venontaj generacioj. Ĝi estas burokratio kun lobiistoj de la grandindustrio, kaj ne sufiĉe demokrata. Komprenibile ni deziras internacian kunlaboron kaj ni konfesu ke ni en la modernaj socioj estas tre dependaj unu de la aliaj, sed ni deziras resti memdecidaj tial, ke oni ne neas tion, kio laŭ ni estas progreso rilate decidojn de la eŭropa burokratio. Eble ni vane revas pri mondo, kie la monavida konscio ne plu regos, sed ni kontraŭstaru, kie estas eble. Ejnar Langkilde, Danio

## Solvo por Jugoslavio

Stefan Maul (MONATO, 1992/11, p. 5) pritraktas la eksjugoslavian problemon. Li dubas ke Unuiĝinta Naciaro, eĉ reformita, povos solvi la problemon. Mi samopinias, ĉar UN bezonus tiucele rimedojn, kiujn ĝi nepre ne havas nun: kapablon kontraŭstari militon antaŭ ĝia komenciĝo per diplomata agado kaj eblecon sendi fortan armeon surloken por malarmi ĉiujn batalantojn. Tiaj gravaj modifoj ne povos enkondukiĝi krom laŭ progresiva, do temporaba, vojo. Des pli urĝas tuj iniciati ilin!

Raymond Marty, Francio

## La Kasacia Respubliko

Aperis artikolo (MONATO, 1992/10, p. 9) pri la konstituciaj rilatoj en Hungario. Ĝi atestas pri ne sufiĉaj konoj pri la jura nocio „kasacio”, same ne pri ties loko en la tribunala organismo kiun administras ĉie ajn la ministro pri justico. Kasacia Kortumo konsistigas ties parton, ĉu kiel aparta instanco, ĉu kiel fako de la plejsupera tribunalo, komprenibile laŭlande diversmaniere. La tasko de la kasacio estas en la jurisdikcio prijuĝi kaj (eventuale) nuligi decidojn – ne de la parlamento! – fare de la juĝejoj. Tiel okazas, se dum la proceduroj la juĝejo neglektis aŭ koliziis jurajn regulojn, leĝajn priskribojn. Temas do pri „formala” reviziado pri la laŭleĝeco en tribunalaj aferoj. Tute alia estas la situacio en demokratiaj ŝtatoj koncerne „Konstitucian Kortumon” – kiu ne okupiĝas pri la supraj „kasaciaj” kazoj de la tribunalaj procesoj en ĝenerala senco. Ĝi ne estas

parto de la tribunala sistemo – do ne apartenas al la sfero de la justicministro. Temas pri memstara branĉo inter la dividitaj ŝtataj potencoj. La Konstitucia Kortumo havas la devon severe gardi la konstituciajn normojn, kiam la aliaj potencobranĉoj, precipe la leĝodona kaj la ekzekutiva, neglektas iujn per siaj decidoj. La kontraŭkonstitucian leĝon, dekretan, decidon, la Konstitucia Kortumo devas nuligi. Ĝuste tiucele ĝi funkcias en demokratiaj landoj. En Hungario tiun kortumon elektis la plurpartia demokratia parlamento kaj ĝi daŭre nuligas precipe malnoviĝintajn paragrafojn, jen novajn, kiam ĝi konstatas kontraŭecon al la konstitucio. La artikolo bedaŭrinde spegulas la troajn registarajn pretendojn, transpaŝi eĉ fiksitajn kadrojn de la konstitucio, surbaze de la plimulto parlamenta. Se temas pri ties juristo-membroj neniun surprizos ke ili prefere ellasas vetoi jure mise kreitajn leĝojn al la Kortumo, anstataŭ mem kontraŭdiri al siaj plenpotencon pretendantaj sampartianoj... Komprenibile la parlamento neniel perdas el sia potenco. Eĉ la parlamenta plimulto, subtenanta la registaron, devas respekti en la leĝokrea laboro la potencon de la konstitucio, kiu protektas la rajtojn de la tuta loĝantaro, mastro de la parlamento. Montriĝas bedaŭrindaj tendencoj en la hungara politika vivo, ke la troigantaj plimultuloj bremsas la ilojn de siaj oponentoj, ofte en skandala maniero, kvaŭzaŭ tiuj lastaj ne estus oponentoj sed malamikoj.

Fenyvesi Ervin, Hungario.

## Demokratio lamas

Gratulon pro la leginda artikolo „Demokratio lamas” de Don MacKay (MONATO, 1992/11, p. 9). Mi trovis klara kaj pensiga lian analizon de la brita elektosistemo, sed permesu al mi du komentojn. Unue mi ŝatus scii kio estas la historia origino de tiu sistemo, ĉu la iama povo de la granda terposedantoj? Due mi opinias ke la aŭtoro trosimpligas kiam li asertas ke la nuna sistemo ĉiam donas la venkon al la konservativuloj kiuj tial ne deziras ŝanĝon. Post la dua mondmilito ja alternis laboristoj kaj konservativaj registaroj kaj laŭ miaj kalkuloj la laboristoj regadis entute dum 17 jaroj (6 + 6 + 5 jaroj) kaj la konservativuloj dum 30 jaroj (13 + 4 + 13 jaroj ĝis nun). Se dum siaj 17 jaroj da regado la laborista partio ne enkondukis sian ŝajne preferatan elektosistemon kun proporcia reprezentado, tio signifas

ke ankaŭ la laboristoj kiel venkintoj tuj „forĝegas” modifi la ekzistantan elektosistemon ĉiufoje kiam ĝi donas al ili la venkon kaj la absolutan plimulton en la parlamento.

Eskil Svane, Francio

## Pri nomoj

Ja ordo de familia kaj persona nomoj (MONATO, 1992/6, p. 7) dependas de la nacia kutimo. Ĝi ankaŭ dependas de la socia klaso, almenaŭ en mia lando. Laŭ respublika tradicio, familia nomo antaŭas personan, almenaŭ ĉe simplaj civitanoj. Estas strange observi, ke, kiel faris nobeloj, simpluloj kutime intervokas sin per siaj familiaj nomoj; tiel kelkfoje vokas edzino sian kunulon, sed ne recipokas. Fakte nur etburĝoj sisteme uzas la personan kaj nur ĝin. Tamen mi notas, ke, de kelkaj jardekoj, la reakcia vento, kiu nun ciklonblovas ĉe la eŭropa kontinento, ne domaĝis mian landon kaj mi konstatas ĝeneralan oftan preferon por la individua nomo. Mi sentas min iom ofendita, kiam iu, neintimulo, vokas min tiele. Ĉu mi ne legis, antaŭ kelkaj semajnoj, en Esperanto-revuo, uzon de Ludoviko anstataŭ Zamenhof? Kiu sociologo liveros sian tiuteman studon al nia medito? Sendepende de mia principo, mi opinias saĝa la decido de la redaktisto, kiu lasas al ĉiu la zorgon elekti sian vokmanieron.

Cnudde Albert, Francio

## Ĉio je sia loko

En via respondo al Ionel Onet pri la eventuala uzado de majuskloj pro familiaj nomoj vi skribis: „Plej ofte propra nomo staras antaŭ familia nomo...” Vi evidente ellasis gravan kvalifikilon: „inter tiuj kiuj abonas MONATON” (nome, tiuj en landoj kun konverteblaj kaj abundaj valutoj). La kontraŭa ekzemplo, kiun vi donis — Japanio — tute ne estas izolita kazo; vi forĝesis mencii ekzemple Koreion, Vjetnamon, Togolandon, Kampuĉeon, kaj almenaŭ du landojn forte reprezentatajn en la Esperanto-movado: Hungarion kaj Ĉinion (kiu lasta cetere enhavas preskaŭ kvaronon de la monda loĝantaro). Eĉ en la tradiciaj okcidentaj landoj la familia nomo ne ĉiam troviĝas en la fino de la plena nomo. Ekzemple, antaŭ sia edziniĝo s-ino Angela Harlow, kiu devenas de hispanlingva lando, estis f-ino Angela ARELLANO Paez. Uzado de ia indikilo por signi la familian nomon ŝajnas al mi bone motivita. Mia propra kutimo estas tiu de la majuskloj.

Donald J. Harlow, Usono

Aldona noto: Ne nur vi faras antaŭsupozojn pri „plej ofte”. En la tria epizodo de la ĉisezona usana televidserio *Star Trek: The Next Generation* aperas nova oficiro sur la stelŝipo *Enterprise*, subleŭtenanto Ro Laren. Kiam ŝi mencias, unue al Riker, poste al Picard, ke Ro estas la familia nomo, ambaŭ montras surprizon, ĉar — en tiu epoko de plena internacia kaj eĉ interplaneda interkompreno (kompreneble, pere de la angla lingvo) — tiu nomordo estas tute nekomprenata.

djh

### Movada movlaboro

Amador Diaz en sia artikolo pri la Falklandaj/Malvinaj Insuloj (MONATO, 1992/7, p. 8) ne menciis la fakton ke, kvankam la brita armeo renversis la invadon, la invado (laŭ tio kion mi legis en la bonkvalitaj gazetoj tiam kaj poste) estis kvazaŭ permesita, eĉ invitita, se neintence, de unu-du agoj de la tiama brita registaro. Ekzemple, la revokado el suda Atlantiko de kelkaj britaj mararmeaj ŝipoj kiuj ĝis tiam ĉiam servis kiel kvieta averto al invaduntoj. Sed la plua informo (Kelkaj sciindaĵoj...) indikas al solvo de tiaj problemoj estontece — ŝajne oni simple movas la koncernan teritorion. Ĉikaze nun estos multe pli malfacile por Argentino invadi la insulojn, ĉar ili nun troviĝas en la suda Pacifiko. Jen, supozeble, grandega movlaboro, sed pli bona ol milito...

Douglas Kershaw, Britio

### Ĝenerala apreco

Dum UK en Vieno mi sukcesis aĉeti du numerojn de la eminenta revuo MONATO. Artikolo pri diskriminacio (MONATO, 1992/8, p. 6) kaptis mian atenton. Tamen malplimulto ne postulu pli da rajtoj ol havas la loka nacio kaj ne trudu sian lingvon al alinacianoj. — Tute alia temo: senĉese mi ne miras, ke al iu ŝajnas la akuzativo malfacila. Oni lernu kiuj verboj estas transitivaj kaj kiuj ne. Alia fakto: plej ofte ĉe transitivaj verboj oni tuj rimarkas ke la frazo ne estas kompleta se oni preterlasas la objekton. Kvazaŭ spontanee oni demandas: kion? Vere ankaŭ estas kelkaj troaj akuzativoj, kiujn oni devas elimini. Estas strange se oni ion komplikas kaj poste plendas, ke ĝi estas komplika. Ankaŭ el la dato oni povas forigi la akuzativon: anstataŭ diri: la 16an de... oni povas diri: en la 16a de... Ĉeĥoj kiel germanoj havas helpilon, ĉar en iliaj lingvoj ekzistas similaj formoj.

Marie Bartovská, Ĉeĥo-Slovakio

### Malabonantoj

Du abonintojn gajnis MONATO. Se mi ne taŭge komprenis la argumentojn de la unua, kompense mi tute komprenas la duan kaj mi samopinias pri ĝi. Fakte, kiel s-ro Ŝalamon (MONATO, 1992/7, p. 6), min agacas la oftaj mistikaĵoj kaj mistika propagando rektaj aŭ malrektaj, kiujn mi malkovras ĉe pluraj paĝoj de ĉiu numero de la revuo. Same mi malkonsentas kun nombraj negativaj kritikoj pri malkapitalismaj ideologoj kaj idealistoj. Ekzemple fotografaĵoj pri Lenin (MONATO, 1992/6, p. 9) akompanas tiu komento: „La supereco de socialismo, kiel Lenin ĝin konceptis, nun ŝajnas nur komika naivaĵo.” Ĉu forgesindas la fakto, ke tiu komika naivulo sindonis kaj suferis je la profito de aliuloj, kiam — ĉu pli saĝe? — eblis al li vivi komforte? Laŭ la sama koncepto, kiom ni konas de komikuloj, inkluzive de iu petolulo Zamenhof, kies komika naivaĵo permesas, ke mi skribu al vi. Tiuj naivuloj por ni esperis... kiam eĉ ne necesas esperi por ekceli. Krom se ĝi nombras tro da legantoj, ĉu tempo ne venis por MONATO diri al kiu haveno kaj per kia ŝipanaro ĝi celvelas? Albert Cnudde, Francio

*N.d.l.r.: Post ĉiu artikolo MONATO mencias kiu ŝipano verkis la koncernan tekston.*

### TEĴA protestas

Malaperos el MONATO la rubriko RADIOPROGRAMOJ laŭ anonco de la redakcio (MONATO, 1992/11, p. 3). Pri la malaperigo oni ne donas klaran kialon. Kiel prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) mi ne nur bedaŭras ĉi tiun decidon, sed ankaŭ protestas kontraŭ ĝi en la nomo de niaj membroj, kiuj laboras en radiostacioj sub pli kaj pli malfacilaj kondiĉoj. Oni ĉesigis la Esperanto-elsendojn de Svisa Radio Internacia kaj Radio Zagrebo, kaj ankaŭ esperantistaj ĵurnalistoj de aliaj stacioj spertas malfacilaĵojn. Dum la UK en Vieno, nelaste pro tiuj ĉi minacoj, reprezentantoj de la Esperanto-radio-redakcioj en rezolucio alvokis „la Esperanto-gazetaron doni pli da atento al la popularigado de radio-elsendoj de diversaj stacioj per regula informado pri ili.” Mi ne povas kompreni, kial nur kelkajn monatojn post tiu ĉi alvoko MONATO faras tian rekte kontraŭan, malsolidaran paŝon. Se temas pri la spaco en la magazino, tio ne povas esti argumento: du paĝoj jare por la radioprogramoj vere ne multe ŝarĝas

revuon kun 384 paĝoj jare! Do mi forte esperas, ke MONATO revizios sian decidon kaj daŭrigos plenumi sian inform-devon, aperigante kiel ĝis nun la Esperanto-radioprogramojn.

Stefan Maul,  
TEĴA-prezidanto, Germanio

*N.d.l.r.: MONATO ne fortiras sian subtenon de la radiostacioj, ĉar ni tute bone komprenas ke radiostacioj bezonas ĝin. Tamen, se por respondeculoj de radiostacioj mem ne valoras la penon sciigi la redakciojn de MONATO kaj aliaj revuoj pri ŝanĝiĝoj de frekvencoj, ili ne povas riproĉi la revuojn. Tial: se radioredakcioj informas nin pri gravaj aŭ etaj ŝanĝoj, tiuj informoj trovos lokon, ĉu en la rubriko NOTICOJ, ĉu kiel specialan radio-rubrikon. Krome, la ĝeneralaj informoj pri radiostacioj daŭre ricevos merititan lokon en LA JARO.*

### La nova MONATO kaj IRKoj

Mi tute konsentas pri la planoj ampleksigi kaj malampleksigi rubrikojn. Evidente, mi estas sufiĉe averaĝa leganto, pli juna tamen, sed ja plenkreskulo. Tamen mi ŝatus plu legi pri gravaj ŝanĝoj en radioprogramoj, eble sub la rubriko NOTICOJ. Ĉi-foje en tiu rubriko estis artikolo pri malĝuste stampitaj IRKoj. Ilin oni produktas ne nur en orienta-Eŭropo. Antaŭ nelonge mi ricevis tian papereton el Aŭstrio. Mi provis ŝanĝi ĝin, kvazaŭ mi ne sciis pri la eraro, kaj oni senplende akceptis la kuponon. Sed, ĉar ne ekzistas rajto je tio, mi ne konservus IRKojn kun malĝustaj stampoj, por plusendi ilin en kazo de bezono; tion mi alikaze ja faras. Nun al la artikolo pri Litovio. Mi ne volas kontesti ke Sovetio alportis grandan maljuston al Litovio. Sed la damaĝo-kalkulo ne estas tute serioza. Ne ĉiuj el la menciitaj kostoj vere estas damaĝo, ĉar se Litovio ne estintus aneksita al Sovetio, ĝi bezonintus propran armeon, kiu ankaŭ kaŭzintus kostojn.

Reinhard Pflüger, Germanio

Se tiu ĉi kvadrato estas ruĝa, via kotizo por 1993 ne jam atingis la eldonejon en la 15a de decembro. Pagu tuj, ĉar la februaran numeron ni sendos nur al tiuj kiuj rekotizis.

**BRAZILO**

# Krimo de responso

Pro krimo de responso la deputitaro de Brazilo kulpigis prezidanton Fernando Collor [Kolor] en senprecedenta voĉdonado la 29an de septembro 1992 kaj konsekvence interrompis la prezidantecon de Fernando dum 180 tagoj por juĝi la krimon. Notinde estas, ke kiam tiaj politikaj situacioj prezentiĝas en Sud-Ameriko, kutimas aperi puĉoj, ĉi-foje la demokratio ŝajne venkis; ĉu finfine anonciĝas la civilizo?

## La ĉasisto de maharaĝoj

Antaŭ du jaroj kaj duono la tiam ĵus elektita respublikestro adoptis la plej popolismajn manierojn, kiujn la faŝistoj jam inventis kun konvinkaj demagogiaj paroloj. Inter la demagogiaĵoj la superhomo Collor sin prezentis, kiel nelacigeblan ĉasiston de „maharaĝoj”. Kompreneble, por tia ĉasado li ne pretendis vojaĝi al Hindio, ĉar ja la maharaĝoj estis nenio plia ol senfinaj privilegiuloj komforte instalitaj en la labirintoj de la brazila monstra ŝtato. Neeblas citi ĉiujn, ni tamen retenu la fantomajn oficistojn (fantomaj ĉar ili neniam aperas por ion fari!), kiuj ricevis salajrojn 160 oble pli grandajn ol ordinaraj laboristoj; kiuj havis administrejojn kun 5 tajpistinoj por ĉiu skribmaŝino kaj pli ol 10 ŝoforoj por ĉiu aŭtomobilo. Pri la palacoj de la ministroj kaj altranguloj ni ne parolu, ja la prezidanto tamen vendis dekon el centoj!

## La superhomo

La superhomo Collor, la savanto de l' patrio, kiu sportumis, flugis, naĝis, akvoskiis, biciklis, ankaŭ pretendis privatigi la ŝtatajn deficitajn entreprenojn, ordigi la publikajn financojn, malŝveligi la ŝtataparaton mem, nuligi la inflacion, revenigi la ekonomian disvolviĝon. Bedaŭrinde post pli ol 2 jaroj nenio tia okazis; la tuta lando estis kondukita al terura regreso, krizo, kie la restanta industrio (3346 entreprenoj bankrotis) produktas malpli ol 30 % de sia kapablo. La senlaboreco estas katastrofa, la sanservoj preskaŭ ĉesis, la edukaj sistemoj ne plu plenumas sian socian rolon, strikado daŭras esti modo, kaj la inflacio iĝis stabila je preskaŭ 25 % en la monato, 1000 % jare! Ankoraŭ bone funkcias la bankoj kaj ĉiuj spekuladoj en borsoj, ĉar en Novjorko aŭ Londono oni plu

aĉetas sojon, kotonon, kakaon, oranĝsukon, k.s.

## La koruptado venkis

Por neniu brazilano estas sekreto, ke Collor elektigis por kontraŭstari al la „komunisto” Lula danke al du sistemoj, unue la potenca TV-Globo kaj due la korupta „skemo de P.C. Farias”. La sistemo P.C. arigis riĉegon pere de subtablaj negocacoj kaj favorigaj influaj ludoj ĉe grandaj internaciaj entreprenoj, ĉe monopoloj, ĉe oligarkoj ligitaj aŭ ne al la ŝtato por la politika kampanjo. Poste, ĉar la sistemo bone funkciis, la lerta P.C. Farias daŭrigis la koruptadon por la amikoj, kial ne?

De pli ol unu jaro oni sciis, ke eĉ ministroj konfesis sian intencon riĉiĝi, kial ne profiti la unikan oportunon? diris ekzemple la eksproleto, eksministro pri laboro Magri. Kaj kion diri pri la ministro pri sano, kiu devis alfronti la problemon de la ĥolero? Li rapide devis agi, pli ol la bakterioj, kompreneble: tial li aĉetis 23 500 biciklojn kun la respektivaj akcesoraĵoj kiel pluvombreloj, por ke la kompatindaj oficistoj laboru kontente malkolere kontraŭ la diabla ĥolero... Ni facile imagas roton de 20 000 kuracistoj sur biciklo kun ombrelo jen por pluvo, jen por la suno en ĉiuj vilaĝoj de Brazilo por la flegado... kiu kostis al la kofroj de la ŝtato la duoblan prezon. Intertempe la bicikloj rustiĝis kaj la ĥolero plu vivas.

## La domo de Dinda

Tio estas la meĉo, kiu eksplodigis la skandalon pere de Pedro, la propra frato de Fernando, kiu pro familiaj kvereletoj decidis montri pruvojn pri la korupta ligo de la prezidanto al P.C. Farias. Tiu malavarulo tutsimpe, ĝentile, pagis la kostojn de la prezidanto, de la edzino kaj pliaj amikoj, kaj la 6,5 milionoj da dolaroj, kiujn ĉiuj ĵurnaloj de la mondo anoncis, estis nur sensignifa parto. En la domo de Dinda (kiu ja apartenas al Collor) sole la ĝardeno kun akvofaletoj kaj pliaj dekoraciaĵoj aŭ ornamaĵoj kostis 4 milionojn da dolaroj... ĉerpitaj el la impostoj. ktp. Sufiĉas! ekkriis la popolo.

## La leciono pri demokratio

Se demokratio estas la regado de la popolo per la popolo, kaj se la po-

polo konsistas el individuoj, estas evidente, ke la plej bona demokratio estas tiu, kie la individuoj scias mem sinregi kun plena responso. Kaj se en la socio devas ekzisti regantoj al kiuj ni cedis nian reprezentatecon, tiu reprezentado devas okazi sub plena respondeco, kie la korupto ne povas havi lokon. Ni esperu ke ankaŭ la brazila popolo ekkonsciis pri tio.  
Gilbert LEDON

**RUMANIO**

# Prezidanta baloto

Fine de 1992 en Rumanio okazis prezidantaj kaj parlamentaj elektoj. Por prezidanteco konkuris jenaj kandidatoj: Ion Iliescu [Iliesku], la prezidanto de Rumanio, Emil Constantinescu [Konstantinesku], universitata instruisto, Gheorghe [George] Funar, la urbestro de la urbo Cluj [Kluĵ], Caius [Kajus] Traian Dragomir, Ion Mînzatu [Minzatu] kaj Mircea Druc [Mirĉea Druk], ĉefministro de Moldavio. La kandidatoj ricevis jenajn rezultojn: Iliescu 47,34 %, Constantinescu 31,24 %, Funar 10,88 %, Dragomir: 4,75 %, Mînzatu 3,05 % kaj Druc 2,75 %.

Ĉar neniu el la kandidatoj ricevis la duonon plus 1 voĉdono, okazis dua elektoproceduro. Tiam Ion Iliescu gajnis 61,43 % kaj Emil Constantinescu 38,57 %.

Gheorghe SALAHURA



*Ion Iliescu, denove prezidanto de Rumanio.*



# Komplikitaj rilatoj inter Ĉeĥio kaj Germanio

Post la falo de la fera kurteno kaj la pereco de la komunismo, ekestis novaj kondiĉoj por najbaraj kunlaboro kaj amikeco inter ĉeĥoj kaj germanoj. Bedaŭrinde, la rilatoj ne prosperas tiel glate, kiel komence multaj esperis.

## Historiaj ŝarĝoj

Germanoj kaj aŭstroj, loĝantaj sur la teritorio de Ĉeĥio apartenis dum jarcentoj al privilegiita reganta grupo. Nur fine de la 19a jarcento, kun la kresko de la ĉeĥa nacia emancipiĝo, la situacio ŝanĝiĝis kaj kulminis en la fondo de sendependa ĉeĥoslovaka ŝtato. Sed en la tridekaj jaroj ekflamis en Ĉeĥoslovakio la germana naciismo kaj faŝismo. Tragedio por ĉeĥoj fariĝis la „interkonsento de Munkeno” en la jaro 1938, laŭ kiu Ĉeĥio devis transdoni al Germanio grandajn limregionojn, en kiuj parte loĝis germanoj (sudetoj). Tio tamen ne malhelpis al Hitler okupi unu jaron poste la tutan Ĉeĥion. La ĉeĥoj loĝantaj en tiu regiono estis elpelitaj. Post la milito Usono, Britio, Francio kaj Sovetio decidis forŝovi ĉiujn germanojn el orient-eŭropaj regionoj. Tial ankaŭ sudetaj germanoj devis forlasi Ĉeĥion. Jen tia estas la historio. Sed kiel ĝi rilatas al la nuntempo?

## Disputoj

Ĉio komenciĝis, kiam la nova ĉeĥoslovaka prezidanto Václav Havel petis pardonon ĉe germanoj pro la elpelo post la milito. Multaj ĉeĥoj, kiuj ankoraŭ bone memoris la krimegojn de la germanoj kaj iliajn planojn pri parta germanigo, sklavigo kaj likvido de la ĉeĥa nacio, ne povis kompreni, por kio la prezidanto petis pardonon. (Ĉu ne devus pardonpeti la germanoj?) Havel celis kun sia pardonpeto daŭran repacigon de ambaŭ nacioj. Bedaŭrinde, tio ĉe la germana flanko ne estis akceptita, kaj verŝis nur akvon sur muellilojn de reakciuloj, kiuj ĉiam sciis, ke la germanoj estas ‚viktimoj’ de la milito. Kelkaj eĉ postulis similan pardonpeton ankaŭ de la pola prezidanto Wałęsa [Vaŭensa].

Plifortiĝis ankaŭ la voĉoj postulantaj de Ĉeĥoslovakio financan kompen-

son aŭ redonon de la iama havaĵo al sudetaj germanoj. Germanio konsideras la elpelon kiel krimon kaj kulpigas Ĉeĥoslovakion, malgraŭ tio, ke la elpelo efektiviĝis laŭ decido de la venkintaj ŝtatoj. Ĉeĥoslovakio proponis fari tra la historio dikan strekon, reciproke rezigni pri kompensoj kaj intertrakti nur pri la estonta kunlaboro. La germana flanko malakceptis tion. Kiam la ĉeĥoslovaka ministro pri eksterlandaj aferoj Jiří Dienstbier [Jirĝi Dinstbir], atentigis Germanion, ke la damaĝoj je homoj kaj havaĵoj faritaj dum la germana okupado estas multe pli grandaj ol eblaj kompensorajtoj de sudetaj germanoj, la ĉefparolanto de la germanaj reakciuloj, parlamentano Bötsch [Beĉ], arogante deklaris, ke Ĉeĥoslovakio havas laŭ internacia rajto neniam pretendojn je kompenso, ĉar ĝi ne troviĝis kun Germanio en milita stato. La disputoj endanĝerigis la subskribon de la nova german-ĉeĥoslovaka interkonsento.

Fine ambaŭ flankoj decidis, ke la demandojn pri la kompenso oni en la interkonsento ne traktos. La germana parlamento tamen akceptis rezolucion, kiu kondamnas la privatigon de germanaj havaĵoj en Ĉeĥoslovakio. La ĉeĥa parlamento sia-

flanke deklaris, ke la sudetaj germanoj ne havas rajton ricevi sian iaman havaĵon. Germanio krome malakceptis agnoski la senvalidecon de la „munkena interkonsento”. Laŭ la opinio de la germana registaro tiu interkonsento estis dekomence jam senvalida (kiel tion agnoskas ekz. Britio), sed nur ekde kiam Hitler okupis la restan teritorion de Ĉeĥio. La germana registaro volas tiel eviti, ke la sudetaj germanoj neniam estus iĝintaj germanaj civitanoj. Sed tio signifas ankaŭ, ke la germana flanko konsideras la forpelon de ĉeĥoj en la jaro 1938 kiel laŭleĝan faron, dum la elpelon de germanoj en la jaro 1945 kiel neleĝan kaj kriman faron. Ĝuste pri tiel grava fakto, ke la elpelon de ĉeĥoj antaŭis la elpelo de germanoj, germanaj politikistoj kaj amaskomunikiloj persiste silentas. La germanoj ne volas vidi, ke ilia elpelo estis nur logika sekvo de iliaj propraj krimegoj. La interkonsento kun Germanio – por la ĉeĥoj malgraŭ ĉio tre grava – estis akceptita. Sed la fakto, ke la ministro Dienstbier ne plu estis elektita dum la lasta balotado, povas speguli koleron de la ĉeĥoj pri lia tro timema politiko kontraŭ Germanio.

Jiri PROSKOVEC

La nocio ‚sudetgermanoj’ validas por la parto de la germana popolo, kiu ĝis sia forpelo en 1945/46 loĝis precipe en Bohemio kaj Moravio. En 1948 fondiĝis en F.R.Germanio la „Sudetgermana Samnacionaro” (germane: *Landsmannschaft*), kiu ekde tiam reprezentas la bezonojn de tiu parto de la germana popolo. Precipe la libera ŝtato Bavario oficiale subtenas kaj akcelas tiun asocion (la sudetoj kiel „kvara bavara tribo”...). La Sudetgermana Samnacionaro estas apud la silezianoj la plej signifa unuiĝo de germanaj forpelitoj. Diversaj internaj tendencoj firmiĝis, kiel la socialdemokrata ‚Seliger’-komunumo; la kristana ‚Ackermann’-komunumo kaj la dekstrema ‚Vitiko’-unuiĝo. Krom tio ekzistas aro da sudetgermanaj institucioj en Germanio, i.a. la Sudetgermana Arĥivo en Munkeno, la Sudetgermana Akademio kaj la *Collegium Carolinum* (esplorojo en Munkeno, kiu okupiĝas pri la historio de Ĉeĥio kaj Slovakio). Ĉiuj tiuj organizaĵoj estis ĝis 1989 atakitaj de la komunisma Ĉeĥo-Slovakio kaj denunciitaj kiel ‚revenĝemuloj’.


Nur post la politika turniĝo en Ĉeĥo-Slovakio ekestis unuaj kontaktoj inter reprezentantoj de sudetgermanoj kaj ĉeĥo-slovakaj politikistoj. Eldiroj de prezidanto Havel komence de 1990 pri la neleĝa forpelo de la sudetoj eksplodigis grandan diskutadon en Ĉeĥo-Slovakio. En marto 1991 ankaŭ la slovaka nacia konsilantaro pardonpetis ĉe la slovakiaj germanoj pro la spertitaj suferoj. Malgraŭ la ambaŭflanka intenco komplete repaciĝi, ĝis nun definitiva interkonsento ankoraŭ ne povis esti trovita. La ĉeĥo-slovaka registaro firme rifuzis la postulon je kompensado de la sudetgermanoj.

red.

SPECIO-PROTEKTADO

Ekvatoro en Italio

Je la eniro de la „Domo de l' papilioj” vin atendas surprizo: la abunda, malseka varmo, kiu rapide decidigas vin demeti kelkajn vestojn. Sed la surprizo sekvanta estas multe pli kontentiga: tropika ĝardeno, kie flugas aŭ kamufligas grandnombro da papilioj kun brilaj koloroj. Temas pri *Butterfly House* [Báteflaj Haŭs], la



En la „Domo de l' papilioj” apud Padova, Italio, vivas kiel en tropika ĝardeno (de supre suben) *Caligo* memnon el Amazonio, *papilio rumanzovia* el Filipinoj, *Pachiliopta aristolochiæ* el Tajlando kaj *Cetosia obscura* el Malajzio.

„Domo de l' papilioj”, aranĝita en Montegrotto Terme, je malmultaj kilometroj el la urbo Padova.

Laŭ la fondinto, juna itala entomologo, Enzo [Enco] Moretto: „La ideo aranĝi iun Domon por papilioj al mi turniĝis enkape ekde kiam mi studis en Nederlando... Mi demandis min senĉese: kial ne eblas, ankaŭ en Italio, prepari ŝirmitan areon, kvazaŭ vivantan laboratorion?”. Tiel la junulo konstante ellaboris, kune kun iuj amikoj, kaj en duo da jaroj li plenumis sian projekton: tropika ĝardeno ene de klimatizita varmejo, kaj botanika parko kun centoj da insektaj specioj kaj plantoj.

Unu el la kialoj, kiuj malfaciligas la realigon de tiaspecaj instalaĵoj – kaj pro tio „Butterfly House” ĝis nun estas la sola en Italio – estas la malfacilo gardi kontraŭ malsanoj kaj la parazitoj de la plantoj, kaj la neeblo uzi fungicidojn aŭ aliajn kemiaĵojn. Finfine Moretto sukcesis efektiviĝi medion ekvilibranta pere de naturaj faktoroj. „Ni ekiris el la antaŭsupozo, ke iom da spaco havu ankaŭ la parazitoj, precize kiel okazas en medioj ne malpurigitaj de l' homa interveno. Tiel ni batalas per naturaj armiloj kontraŭ afidedoj, akaroj kaj kocoj pere de mikroarmeoj de malgrandaj vespoj, kokcinoj kaj libeloj, kiuj sin nutras per plantaj parazitoj!

La „Domo de l' papilioj” loĝigas iujn el la pli belaj ekvatoraj papilioj, perfekte adaptitaj al la ĝardeno, kiu imitas ilian medion naturan. Kelkaj specioj, el Ameriko centra kaj suda, posedas la rekordon pri longviveco: ses monatojn vivdaŭre.

La strukturo estas alirebla al sciencistoj pri plantoj kaj insektoj, kiuj tiel evitas multekostajn vojaĝojn al tropikaj landoj. Super ĉio, tamen, ĝi estas alirebla al la turistoj, kiuj povas admiri la ekzotan pejzaĝon ene de l' fragilaj kristalvandoj de la „Domo de l' papilioj”.

Gianfranco CAZZARO

JAPANIO

Bonvola ŝtato

Lastan julion, la supera kortumo de Tokio renversis la juĝon de la distrikta kortumo de Tokio (tribunalo de unua instanco), kiu kondamnis iun ĵurnaliston pro obsceneco. Li estis malkovrita en posedo de importitaj pornografiaj literaturaĵoj.

La kialo de la nuligo de l' unua ver-

dikto estas ke li tenis ilin nure por sia propra konsumo kaj ne kun komerca intenco, nome por revendo.

Tio estas iom epokfara, estante decida apartiĝo de la ĝisnuna viktoria sinteno de la japanaj jurisdikciaj instancoj („Problemoj pri pornografiaĵoj”, MONATO 2/85). Ĵurnalistoj, kiuj pretendas esti klerigitaj, esprimis surprizeton, eĉ embarason, pri tiu ĉi „progresema” decido, kiel ekzemple kolumnisto de la „liberala” *Asahi*.

Neniu demandis kial estas puninda posedo de la sama objekto por revendo se tiu por fina konsumo ne tiel estas.

YAMASAKI Seikō

Kiom kostas murdo?

La aktuala libermerkata mekanismo funkcias en Moskvo ankaŭ sur tereno de ... hom-mortigo. La kosto dependas de tri ĉefaj faktoroj: rango de la estonta viktimo, malsimpleco de la operacio, kaj fine la kvalito de ĝia plenumo.

En Moskvo laboras inter 50 kaj 100 tiaspecaj „fakuloj”, kiuj povas garanti plenumon de la „operacio” ene de nur unu-du tagoj. Minimuma tarifo, por forigo de ordinara civitano, estas jam cent mil rubloj. Sed por likvido de ekz. direktoro de komerca banko oni postulas ĝis 1,5 milionoj da rubloj.

NikSt

Rizo-Arkeologio

Arkeologoj de la muzeo de la universitato Cungbuk anoncis, ke apud la torfotavolo en Ilsan, antaŭurbo de Seulo oni trovis 4 rizsemojn. Atestis la sciencistoj kaj ankaŭ usona instituto, ke ili estis tie lasitaj antaŭ 4340 jaroj. En 1977 oni trovis multajn rizsemojn de antaŭ 2600-2700 jaroj, kaj Son Po-ki, prezidanto de la Instituto de Prahistoria Civilizo de Koreio, trovis argilaĵojn, postsignitajn de rizsemoj, kiuj montras sian tempon antaŭ 3000-3500 jaroj. Tamen ĝis nun, pro nesufiĉa materialo, la rizkultura pratempo estas nomata neolitiko kaj ne fakte, surbaze de la novaj eltrovaĵoj, paleotiko.

En la proksimaj tertavoloj de la laste trovitaj rizsemoj en Ilsan, estas samtempe trovitaj la semoj de kukurbo, kukumo, sojfabo, t.e. la semoj el malproksimaj sudaj landoj. Pro tio la sciencistoj hipotezas, ke korea rizplanto devenis de la subtropika Azio.

AHN Song-san

## Ĉu fajro kuracas?

Detruigis en novembro pro incendio granda parto de brita reĝa palaco kaj kastelo Windsor [Ŭendsr] – koincide, unu semajnon poste, same detruigis parto de palaco Hofburg en Vieno.

La brita reĝino, Elizabeto 2a (ironie, membro de Windsor-dinastio), sin esprimis ŝokita kaj deprimita pro forbrulo de halego kaj ĉambraro de sia plej ŝatata 'hejmo', grava – laŭdire – el historia vidpunkto. Tuj promesis la registaro restaŭri la kastejon – je kosto de 60 milionoj da britaj pundoj provizotaj de impost-pagantoj.

Ekkoleris britoj, dirante, ke la reĝino – riĉulino, kiu pagis neniajn impostojn – devus pagi almenaŭ parton de la restaŭro-kostoj; plue, ke dum recesio ne licas tia granda elspezo por nura palaco, pri kies arkitekturaj kvalitoj disputas fakuloj.

Lastatempe tiom malpopolariĝis la brita monarkio (MONATO, 11/92) ke, por dolĉigi la 60-milionan restaŭropilolon, la reĝino konsentis post la incendio ja fariĝi impost-paganto. Aprobis britoj: sed dubinde estas, ĉu en hodiaŭa Britio la reputacio de la dinastio Windsor tiel facile restaŭriĝos kiel la brikoj de samnoma kastelo.

Paŭlo GUBBINS



Brita reĝino Elisabeth: „1992, la plej malfeliĉa jaro de mia vivo.”



Granda halo ĉe kastelo Windsor, detruita pro incendio – ĉu la fajro restaŭros la reputacion de la brita monarkio?

BRITIO

## Arbo-helpantoj

Vizitanto al Suda Kimrio tuj konscias pri la graveco de la karbominejoj en tiu bela lando. Multloke dominas la pejzaĝon grandaj skoriamasoj, nigraj kaj nudaj. La brita karbokompanio senkulpigas sin, dirante, ke ĝiaj inĝenieroj ja klopodis ripari la vundojn, kiujn ĝi kaŭzis al la tero. Jes ja, oni transportis amasegojn da grundo por kovri la skorion, semis herbon, kaj kemie sterkis, kaj vere, post mallonga tempo la skoriamasoj kaŝiĝis sub kovrilo de juna, verda herbo. Tamen post kelkaj jaroj la bela herbo cedas al muskoj kaj likenoj, la grundo steriligigas kaj la skorio reasertas sian potencon. Ne ĉie, tamen. En la regiono Blaenavon [Blajnavon] volontuloj el la tuta mondo montras, ke eblas revivigi la sud-kimran skorion, sen granda transportado de grundo, sen buldozoj kaj sen kemiaj sterkaĵoj.

Estras la projekton Martin Haigh [Hej], geologo, kiu komencis studi ĉi-tiun problemon antaŭ dudek jaroj. Li konstatis, ke la importita grundo tuj estas sub minaco. La kaŭzo de la problemo estas la fakto, ke la rubaĵo elĵetita el la minejoj venas de tre profunde en la tero. Pro tio, ĝi neniam antaŭe estis elmetata al la efikoj de ventoj kaj pluvoj. Tial, atinginte la surfaceton, ĝi grandskale dispecetiĝas. La rezultantaj eretoj de argilo kungluiĝas kune kun pecoj de skisto kaj grejso. Tiu solida amaso kuŝas nur kelkajn centimetrojn sub la surfaco. Akvo ne povas trapasi ĝin, kaj tial fluas laŭ la deklivoj forportante la importitan grundon. La argila amaso estas tre densa, kaj ne enhavas aeron, tial plantoradikoj ne kapablas penetri ĝin. La erozio estas tioma, ke sulko postlasita de traktoro povas kun la tempo fariĝi kanjoneto.

### Bulgara ekzemplo

Se britaj inĝenieroj fuŝas, bulgaraj ekologoj sukcesas. Dum vizito al la regiono Pernik en 1987, Haigh vidis skoriamasojn similajn al la kimraj, sed kovritaj de betuloj kaj pinarboj. La arboj fakte estas la solvo al la problemo. La bulgaroj unue plantas arbojn kiel la karob-arbon *Robinia pseudoacacia*, kiu kaptas nitroĝenon en la aero kaj tiel fekundigas la grundon. Poste, eblas planti betulojn, fraksenojn kaj pinarbojn. La fortaj radikoj de la arboj povas penetri eĉ la densan argilon. Ili malhel-

pas erozion kaj kreas favoran loĝlokon por diversaj bakterioj, fungetoj, insektoj kaj lumbrikoj. La agado de la estaĵoj kunligas la eretoj de argilo, kaj la pli grandaj pecoj permesas la cirkuladon de aero kaj akvo. La grundo fariĝas pli kapabla por vivteni aliajn bestojn kaj plantojn, kiuj laŭvice plibonigas ĝin eĉ pli. La rezulto estas dika tavolo de riĉa grundo, kiu plene kovras la skiston, kaj en kiu vivas multaj specioj.

Haigh, en kunlaboro kun Svetla Gentcheva, la direktoro de la ekologia fako ĉe la Arbara Instituto en Sofio, provas ekde 1990 la bulgaran metodon en Kimrio. Mona subteno venas el la bonfara fonduso Earthwatch (Terogardo). Volontuloj el ĉiuj mondopartoj pagas por havi la privilegion pasigi du semajnojn luktante kontraŭ peza argilo por fosi truojn sur kimra deklivo kaj sub kimraj pluvoj! En ĉiun truon oni metas humon kaj enplantas arbeton. Post nur du jaroj, Haigh estas certa, ke la strategio povas sukcesi en Kimrio. Ankorau necesas pristudi la efikojn de diversaj manieroj planti la arbojn, la uzon de mulĉo por subpremi trudherbojn, kaj ankaŭ la elekton de arbospecioj – nuntempe oni plantas nitrogenkaptantajn alnojn por unue fekundigi la teron, taj tiam plantan-acerojn kaj fraksenojn.

### Kiel konvinki nekredantojn?

Pli granda tasko ol ĉio alia, tamen, estas konvinki la karbokompanion, kiu ŝajne ne agnoskas la atingojn en Bulgario, ke la ekologia metodo superas la teknologian. Antaŭ nelonge, Haigh devis lukti por reteni kelkajn el siaj provlokoj, kiuj estis minacataj de estonta minejo. Kvankam la karbokompanio finfine konsentis ne detrui ilin, la administrantoj diris, ke la esploroj de Haigh estas seninteresaj al ili. Ili fanfaronas pri siaj novaj aparatoj, kiuj pli efike traboras la argilon kaj skiston. Haigh kontraŭstaras, dirante, ke la fina rezulto estos eĉ pli malbona. Inĝeniero de la karbokompanio ĉesigis telefonan konversacion kun Haigh per la simpla aserto, ke la projekto de Haigh ne povas validi ĉar ĝi ne uzas buldozojn.

Urĝas nun pruvi la superecon de la bulgara metodo. Earthwatch promesis financi la projekton de Haigh dum du pliaj jaroj, en la espero, ke en tiu periodo li sukcesos montri, ke ja eblas arbarigi la skoriamasojn. Je kio dependos la estonto de la sud-kimra pejzaĝo – je buldozoj kaj kemiaĵoj, aŭ je fosilioj kaj arbetoj?

Krys UNGAR



### ENKETO

## Hispanoj respektas bestojn

Hispanoj ne estas internacie konataj precipe pro sia amo al bestoj. Kulpas pri tio „nacia festo” aŭ taŭrobatalo. Tamen, la vero, almenaŭ tion diras enketoj, estas ke granda plimulto da ili kontraŭas tiajn barbaraĵojn. Alivorte, nur malgranda kvanto da hispanoj ankoraŭ ĝuas vidi kiel oni torturas taŭrojn.

Pasintjare, la Internacia Fondaĵo por Defendado de Bestoj (IFAW laŭ anglaj komencliteroj) mendis al prestiĝa entrepreno *Intergallup* enketon por sondi la opinion de hispanoj (escepte kanarianojn, ĉar en ties insuloj taŭrobatalo estas malpermesita) pri la afero. El la rezultoj (erarmarĝeno ± 3,1 %) estas notindaj la jenaj punktoj:

– Al demando, ĉu vi opinias dece suferigi bestojn en festoj aŭ spektakloj, 87,4 % da enketigitoj respondis NE kaj nur 7,9 % JES.

– Al demando, ĉu vi ĉeestis taŭrobatalon en la lasta jaro, 88,4 % respondis ke NE.

– Al demando, ĉu vi opinias ke Hispanio havas malbonan reputacion inter eksterlandanoj pro taŭrobatalo, 60,2 % respondis JES (19,7 % ne respondis).

Malgraŭ ĉio tio, hispanaj politikistoj ŝajnas obstine reklami taŭrobatalon kiel vidindan hispanaĵon (MONATO, 1992/7, p.4). Kial? Supozeble la muziko de moneroj grave rolas: ekzemple, hispana eŭropdeputito Antonio Navarro, kiu estas ĉefo de internacia kampanjo favore al taŭrobatalo, mem estas taŭrobredisto...

Luiso GILPÉREZ Fraile

# El Niño

## perturbas tutmondan klimaton



Meteorologoj bone scias, ke klarigoj pri atmosferaj kapricoj troviĝas fonde de la oceanoj. Ili ne plu disigas la atmosferon kaj la oceanojn, sed male strebas kompreni la interagojn oceano/atmosfero.



Ekzemplo de tiuj ĉi interagoj, kiun meteorologoj atente esploras dum venontaj monatoj estas la ENSO-fenomeno (*El Niño/Southern Oscillation*). La oceana fenomeno (*El Niño*) aperas, iuj jaroj, je la momento de Kristnaska Tago (pro kio oni nomas ĝin *El Niño* [El Ninjo], la infano) laŭlonge de peruaj marbordoj, kutime afektitaj de malvarma fluo. Post falo de la rapido de alizeoj (anonca signo), oni konstatas renverson de la mara fluo, kio rezultigas plivarmigon de la mara temperaturo (ĝis plus 6° C je la surfaco).

*El Niño* estas akompanata de katastrofaj veterkondiĉoj (pluvegoj, inundoj...) sur iuj sud-amerikaj okcidentaj regionoj kun dramegaj konsekvencoj. La plej vasta *El Niño* de la jarcento (1982-1983) kaŭzis multegajn mortintojn, 30 000 senhejmuojn kaj 3,5 miliardojn da usonaj dolaroj de damaĝoj por Ekvadoro, Peruo, Bolivio... sen kalkuli la ekonomikan katastrofon por tiuj ĉi regionoj, kiuj vivas de fiŝado, ĉar la fiŝoj forestis dum multaj monatoj, for de la tro varma maro.

Meteorologoj observis anomaliajn koncerne la kampon de aerpremo super Pacifiko antaŭ kaj dum *El Niño*. Temas pri baskulado de premo-variado je la nivelo de la Pask-insula anticiklonzono kaj la indonezia ciklonzono (Southern Oscillation/Suda Oscilo). Tiu baskulado renversas la alizean reĝimon super Pacifiko. Sed ĉie tra la mondo oni sentas la efikojn de tiu interago ENSO, ĉar la atmosfera cirkulado estas tute perturbita.

Plivarmigante la marsurfacon, *El Niño* igas el la centra kaj orienta Pacifiko regionon de forta ciklona aktiveco (tropika ciklono plifortiĝas kiam la marsurfaca temperaturo superas 27°C). Se en la okcidenta Pacifiko





kaj la Hinda Maro la ciklonoj estas malpli multaj kaj malpli furiozaj ol kutime, kontraŭe Polinezio estas frapita de nekutime fortegaj ciklonoj. Hindaj musonoj ankaŭ estas perturbitaj dum la periodo de *El Niño*. La vintra musono pli multe aktivas (pluvegoj, inundoj), dum la somera musono malpli aktivas (pluvodeficitito, malsatego).

Dum *El Niño* de 1982-1983 multaj aliaj regionoj suferadis pro ŝanĝigo de la normala atmosfera cirkulado.

Senpluveco, loke tre rigora, afliktis partojn de Aŭstralio, Indonezio, Ĉinio, Afriko kaj suda Ameriko. Tro da pluvo ĝenis Okcidentan Eŭropon, regionojn de Usono kun lokaj inundoj, kaj kompreneble la regionon de *El Niño* mem: Peruo, Bolivio, Ekvadoro... Nekutimaj temperaturoj estis observitaj vintre aŭ somere en aliaj regionoj. Eĉ Siberio kaj Groenlando sentis efikojn.

*El Niño* aperis 16 fojojn dum la jarcento, kun meza intervalo de 7 jaroj.

La lasta *El Niño* aperis fine de 1986. Ĝi nun, fine de 1991, revenis laŭlonge de la perua marbordo, kvankam multe malpli forte ol dum 1982-1983. Oni tamen povos nombri ĝian surteran misagadon dum la 18 monatoj de ĝia normala ciklo. La ciklono WASA jam kaŭzis gravegajn damaĝojn sur la insuloj Bora-Bora kaj Tahiti en decembro 1991. Diluve pluvegis sur usona kaj azia regionoj en la printempo.

Gérard FLEUTER

**BALTAJ LANDOJ**

**Litovio forlasas sovetajn rublojn**

Litovaj registaro kaj centra banko decidis ke Litovio, kiel lasta el la tri baltaj respublikoj, forlasos soveta fincan sistemon.

Estonio jam ekde la 20a de junio ekfunkciigis propran valuton, la estonan kronon. La inflacio malaltiĝis de 58 % en junio al 24,3 % en julio kaj 17,6 % en aŭgusto. Oni antaŭvidas ke jara inflacio atingos 25 %. Sukceson de la financa reformo pravas ankaŭ la kresko de la nacia valuto rilate konverteblajn valutojn (en septembro 1 germana marko egalas al 8 kronoj kaj 1 usona dolaro al 11,82 kronoj).

Latvio definitive eliminis sovetajn rublojn la 20an de julio. La latvoj elektis alian vojon. Ili ekuzis provizoran monon, la latvan rublon. Dum ĉirkaŭ du monatoj loĝantoj senlime povis ŝanĝi sovetajn rublojn al la latvaj je kurzo 1:1. Momente en Latvio unu soveta rublo kostas 0,7-0,8 latvan rublon.

Ĝis aperos litova lido (*litas*) en Litovio validos kuponoj (*talonas*). Litovoj konas du specojn de kuponoj: tiuj eldonitaj en 1991 estis uzataj kune kun rubloj kaj tiuj de la jaro 1992 funkciis kiel memstara mono apud rubloj. Ambaŭ specoj ekde oktobro validas kiel provizora valuto.

Loĝantoj kiuj posedis grandan sumon de rubloj ne povis libere ŝanĝi ilin en bankoj. Nur eblis deponi ilin sur personaj kontoj; poste kontoposedanto povis ricevi sian ŝparmonon en kuponoj je kurzo 1:1. Tiuj kiuj ne sukcesis eluzi rublojn ĝis oktobro, povos ŝanĝi ilin en bankoj je merkata kurzo.

Informo pri forlaso de rubloj ne provokis maltrankvilon por la loĝantaro, ĉar oni jam delonge penis diveni kiam la registaro enkondukos propran valuton. Tio nur iom pli vigligis situacion en vendejoj kaj benzinejoj. Homoj aĉetadis precipe alkoholaĵojn, kafon, kuirejajn ilojn kaj juvelojn. En la bankoj subite plikostiĝis konvertebla valuto kaj malgrandiĝis kvanto de ĝiaj vendantoj.

Tamen komercistoj restas iom pesimismaj. Ili opinias ke komplikiĝos reciprokaj pagoj pro komerco inter Litovio kaj eksaj sovetaj respublikoj. Valuto akirita pro vendo de litovaj varoj en alia respubliko devos esti

uzata en tiu respubliko aŭ vendata al alia litova entrepreno kiu deziras aĉeti ion tie. Manko de bone funkcianta pagsistemo povas kaŭzi kolapson de preskaŭ ĉiuj ŝtataj entreprenoj. Aliaj asertas, ke sukceso de tiu ĉi nova paŝo al propra valuto dependos de la litovaj bankoj, kiuj laboru vigle kaj senĝene.

Laimius STRAŽNICKAS

**ARGENTINO**

**Tritiko senvaloriĝas**

La agrikulturistoj de Argentino ricevis kun timo anoncon el Usono, informante ke tiu lando internacie surmerkatiĝos sian tritikon je artefarite malalta prezo.

Tio povas esti katastrofo por la argentina ekonomio, kiu baziĝas sur la agrikulturo. Ĝi ĉefe eksportas grenojn, precipe tritikon. La argentinanoj ne kapablas egaligi tiajn prezojn.

Ne estas la unua fojo ke la usona registaro agas tiel, sed ĉi-foje oni miras ĉar laŭ deklaroj de ambaŭ ŝta-

toj, neniam iliaj rilatoj estis tiom bonaj kiel nun.

La senkulpigo de Usono estas la kutima: ĝi estas devigata fari tion pro la monda konkurenco de la membro-ŝtatoj de la Eŭropa Komunumo (EK), kiuj per dumpingo mallojale forrabas ĝiajn klientojn.

Ĉi tiu merkata situacio estas preskaŭ nekredebla por la argentinanoj ĉar ĝis la dua mondmilito la lando estis konsiderata kiel la monda grenejo. Ĝiaj savanoj sin etendiĝantaj je miloj kaj miloj da kilometroj promesis neelĉerpeblajn, riĉajn kaj facile akireblajn rikoltojn.


La kulturmetodoj de la evoluintaj landoj per kemiaĵoj kaj novaj maŝinoj renversis la situacion. De landoj dependantaj de agroproduktaĵoj ili transformiĝis en produktantojn, kies grenekspluatado nun donas troon, nefacile vendeblan.

La rezultoj de ĉio estas ke la situacio de Argentino kaj pliaj aliaj evoluintaj landoj sur la grenmerkato estas tre malfavora, ĉar ili ne kapablas aĉeti la adekvatajn maŝinaron kaj kemiaĵojn kaj sekve iliaj produktaĵoj malgraŭ la naturaj avantaĝoj ne kapablas konkurenci.

Enrique KOHEI

**Plej vojaĝemaj estas svisoj**

Elspezoj por eksterlandaj vojaĝoj de unu civitano en 1990 (usonaj dolaroj)



Statistiko ofte ja estas interesa pro ebloj kompari, sed kiom ĝi ankaŭ povas erarigi, montras bone ĉi tiu figuro. Ekzemple usonanoj en tute elspezas plej multe por eksterlandaj vojaĝoj, 38 miliardojn da dolaroj jare. Tamen, kaj ĉar ili estas tre multaj kaj ĉar sendube ilia vasta lando invitas libertempojn en ĝi mem, la unuopa usonano elspezas por eksterlanda vojaĝo tre malgrandan sumon. Inverse svisoj: kvankam turisma lando, ĝi estas tre malgranda kaj svisoj do facile kaj rapide troviĝas en eksterlando. Krome ili estas relative riĉaj.

# Ĉu arto savos la mondon?

**Antverpeno sin preparas por iĝi Kultura Eŭropa Ĉefurbo en 1993. Kion la urbo proponas al siaj vizitantoj kaj gastoj tiuokaze? Jen ni koncize prezentas la temon kaj la programon de la antaŭviditaj okazantaĵoj.**

Kiu la nunajn tagojn vizitas Antverpenon — tiun ĉi artikolon mi verkis komence de oktobro 1992 — sendube miras kaj pripensas ke li troviĝas en grandega konstruejo. Domoj kaj oficejoj estas nove konstruataj. Multaj monumentoj kaj vendejoj estas renovigataj, ĉu laŭ publika, ĉu laŭ privata iniciato. La stratoj estas nove pavumitaj kaj ricevas novan meblaron. Fakte, la tuta urbo estas kvazaŭ tute nove planita kaj redestegnata estas la mapo. Plej funde ŝanĝiĝos la ĉirkaŭaĵo de *Meir* kaj *Groenplaats* (Verda Placo), kie piedirantoj finfine ricevos la lokon al kiu ili rajtas. Antverpeno prepariĝas por

akcepti siajn gastojn kiam ĝi en 1993 estos Eŭropa Kultura Ĉefurbo.

## La temo

Dum la arta jaro la gvida temo estos iu pripensado pri la rolo de arto en la ĉiutaga vivo. Ĝi klopodos montri kiel la eŭropaj artoj ĉiam donis kaj estonte daŭre donos aldonon valoran al la vivo. Ĉar artisto ĉiam tenas iun distancon dise de la vivo, li plej bone povas komenti kaj kritiki la socion.

Jam devas esti klare, ke la jaro fokusiĝos kaj sur la estinteco kaj sur la nuntempo. Tial oni prikonsideras la arton laŭ kvar diversaj vidpunktoj. Unue estas la historia retrorigardo. En la pasinteco Antverpeno dum diversaj periodoj ludis ĉefan rolon en la eŭropa kultura vivo. Ĝia glora tempo sendiskute estis la 16a jarcento, sed ankaŭ poste la urbo kontribuis al gvidaj artaj realigaĵoj. Samtempe la projekto klopodos montri la diversecon de eŭropaj kulturoj. Tio estas altvalora temo en epoko, kiam pro pligrandiĝo kaj unuiĝo de la mondo, la unutoneco kaj egaligo minacas sufoki kulturojn. Ĉiam la eŭropaj landoj influis unu la alian, sed tiu influo en la pasinteco ne kondukis al sameco, sed al fekundigo de ĉies specifeco. Kompreneble kultura valoro kaj kvalito superigos ĉi tie la komercan sukceson.

Tria vidpunkto estas la kreiveco kaj aktiveco. Artistoj naciaj kaj alilandaj estas invititaj krei kaj realigi novajn artaĵojn kaj projektojn. Firme ligita al tiu vidpunkto estas la kvara, kiu celas al la daŭrigo de la rezultoj trans 1993. Tiu jaro ne devas esti iu glora jaro plenplena je okzantaĵoj, sed deirpunkto de arta vivo kiu daŭros poste: lanĉejo, ne montrofenestro! La realigo de kelkaj artaj projektoj, kiuj pro propra eco memkompreneble travivos 1993, estas bona semo por realigi tiun deziron.

La organizantoj esperas, ke la tuto ne restas seka, senviva arta afero en



*Petro Paŭlo Rubens*

kio nur partoprenas artistoj. Ili alvokas ĉiujn, la proprajn civitanojn kaj la vizitantojn, interaktive partopreni la feston. Tiel la arta etoso vere povos trabrili en la ĉiutagan vivon.

## La enhavo

La plenigo de artjara temo kaj ĝiaj kvar vidpunktoj kondukis al diversaj manifestacioj en ĉiuj tereno de la arto. La sursceneja artoj, la muziko, la skulptado, la fotografio kaj filmado, la literaturo kaj arkitekturo: ĉiu branĉo ricevos sian lokon. Koncize kaj nekomplete, ni trarigardos la planitaĵojn.

Por prezenti la *historian dimension* oni planis ekspoziciojn de gravaj realigoj el la antverpena pasinteco. Okulfrape en tiu vico estas ekspozicio pri retabloj: lignaj skulptaĵoj kiuj plejofte prezentas bibliajn scenojn orname de la altara apogmuro. Same unika estas prezentado de labor-desegnaĵoj el la privata oficejo de



*La Katedralo*





*Afiŝo anoncanta la Mondan Ekspozicion En Antverpeno en la jaro 1894.*

Pieter Paul Rubens [Piter Poŭl Rubens]. Ankaŭ la ekspozicio pri Antverpeno en la 19a jarcento — kiam dufoje la urbo organizis Mondan Ekspozicion — estos vizitinda.

La *surscenejaj artoj* prezentos i.a. tri novajn operojn de flandraj komponistoj/operverkistoj. Ankaŭ estos loko por koregrafino furoranta Anne Teresa De Keersmaeker [De Kersmaker].



*Anne Teresa De Keersmaeker*

Si viciĝos kun aliaj internaciaj eminentuloj tiufake: Philippe Decouflé [Filip Dekufle], William Forsythe [Ŭiljam Forsajt] kaj Trisha Brown [Triŝa Broŭn].

En la renovigita 19a-jarcenta Bourla Teatrejo [Burla] (je piediranta distanco de la antverpena Esperantodomo) estos surscenigitaj klasikaj teatraĵoj en kiuj rolas „priedemandantoj”. Temas pri teatraĵoj en kiuj la ĉefrolulo serĉas la identecon de la



*La Antverpena Burla teatrejo, post multjara neglekto kaj kadukiĝo la renovigo prilumas ĝian forgesitan belecon.*

eŭropa homo. Oedipus [Ojdipus], Medea, Hamlet kaj Faust [Faŭst] estas nur kelkaj (kvankam eble la plej gravaj) el longa listo. Notinda ankaŭ estas la projekto por konatigi al la plej junaj la teatran arton. Ĝi portas la (Esperante duoble) trafan titolon: „Arto-sub-ok-uloj”.

La flandra *muziko* havas profundajn radikojn. Flandra polifonio siatempe estis fonto de inspiro por la tuta Eŭropo ĝis en Italio, kie Orlandus Lassus [Lassus] realigis siajn plej gravajn artaĵojn. Nuntempe tiu muzikĝenro ĝuas novan atenton. De la 1993a festivalo ĝi do ne povas forresti. Estas nur kvalito-garantio ke eminentaj flandraj muzikistoj — mi nur nomas Sigiswald Kuyken [Sigisŭalt Kejke] kaj Jos Van Immerseel [Jos van Imerzel] — pretas kunlabori.


En la urbo de Peter Benoit — la mu-

zikisto kiu instruis al siaj popolanoj muzikumi — ankaŭ devas ĉeesti la grandaj sinfoniaj sinjoroj reprezentotaj en sennombraj koncertoj: nomi ĉiujn iĝus trolongdaŭra kaj teda listo. Tamen ne miru ke dum 1993 vi ankaŭ povas aŭdi pli modernan muzikon apud la tradiciaj tonoj de etnaj muzikistoj el orientaj, afrikaj kaj sudamerikaj landoj.

La *literatura* projekto estas la plej malfacila por prezenti, ĉar ĝi vere naskiĝos dum la jaro mem. Oni eldonos „Notlibrojn” kun eseoj al kiuj kunlaboras homoj el la nacia kaj internacia literaturaj medioj. La nula numero temos pri silento, pri pensado pri la interespleneco kiel intelektula kriterio; la unua ĝis sesa havos temojn plejdiversaj: Horizono/aerlinio; senvorteco; provincismo/senradikiĝo; zoologio post-moderna; ortodoksio (toleremo); renovigo. La numerojn 7 kaj 8 prezentos imaginaran promenadon tra la urbo. Finfine havos gravan rolon ankaŭ la arkitekturo. Novaj konstruaĵoj, renovigo de sennombraj monumentoj, rearango de la tuta urbo konduke al (espereble) pli bona, pli homa vivmedio...

Vi, leganto, ja rimarkas ke fermiĝis la cirklo. Ni estas re ĉe nia elirpunkto. Vi ricevis enkondukan superrigardon, elektu laŭplace. Antverpeno vin gastigos kaj regalos en 1993.

Guido VAN DAMME



*La domo de Jacob Jordaens*

*Laŭ peto la antverpenaj esperantistoj povas sendi faldfolion esperantlingvan kun pliaj informoj kaj skiza programo. Sendu al: Esperantodomo, Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno, Belgio. Bonvolu okulfrappe noti „Antverpeno 1993”.*

# Skribi en la gepatra lingvo

Evoluig-ekspertoj konsentas, ke la kapablo legi kaj skribi, la t.n. literacio, estas unu el la bazaj kondiĉoj por sukcesa evoluo de landoj de la t.n. „Tria Mondo”. Kaj la koncernaj landoj mem kaj la „riĉaj” landoj, kiuj ofertas „evoluiĝ-helpon” aŭ „kunlaboron” kaj internaciaj organizaĵoj kiel Unesko faris kaj daŭre faras grandajn streĉojn por forigi la analfabetecon de – precipe junaj – homoj el Afriko, Latina Ameriko kaj Azio.

La skribo-kapablon oni rigardas unua ŝtupo sur la vojo al pli bona edukado, kiu ebligu al la homoj pli kaj pli bone helpi sin mem en moderna mondo: Kompreni uzo-instrukciojn por ĉiuspecaj maŝinoj kaj iloj, medicinajn receptojn, avertotabulojn, ktp. Kelkaj opinias la lego-kaj skribo-scion tiel baza, ke ili konceptas aliron al tiu scio eĉ fundamenta homa rajto. Se plej multaj fakuloj do konsentas pri la atingenda celo, ne ĉiuj same konsentas pri la vojo irenda tien. Kiun gradon de lego- kaj skribo-kapablo oni alcelu je kiuj kostoj? Kiom da estas dezirinda, kiom da estas efektivebla per la haveblaj rimedoj? Kiujn preferojn oni establu? Kaj demando esenca en tiu kunteksto: en kiu lingvo la infanoj aŭ plenkreskuloj lernu legi kaj skribi?

## Funkcia literaciigo

En Afriko longe oni aplikis la samajn instru-celojn kaj -metodojn kiel en Eŭropo. Tio signifis, ke la lernantoj lernu la oficialan ŝtatan lingvon tiel, kiel eŭropa lernanto devas alproprigi ĝin. „Ŝtata lingvo” signifis, kaj en plej multaj kazoj ankoraŭ hodiaŭ signifas, la lingvo de la iamaj koloniistoj, en Afriko do, precipe la angla kaj franca. La afrikanoj devu scii ĝin kiel angloj kaj francoj. La rezultoj de tiu instruado tamen ne estis tro kontentiga. Tro grandaj estis la problemoj lerni legi kaj skribi en lingvo, kiun la lernantoj eĉ ne ĉiukaze bone parolas, ĉar hejme ili parolas unu de la multaj afrikaj lingvoj. Ofte ankaŭ mankis la kompreno pri la bono de literacio: Kial entute trejni tiun scion, se poste apenaŭ estas ebleco praktiki ĝin, ĉar mankas libroj? Kaj plie: kion oni, krom legoscio, povis lerni el la instrulibro importitaj el Eŭropo? Konata estas la fama ekzemplo de la afrikaj infanoj en la iama franca Senegal, kies lernolibro komencis per „Niaj prauloj, la gaŭloj, ...”. Dum


la lastaj jaroj la edukado en la junaj afrikaj ŝtatoj tial nove orientis sin. Kiel respondo al la demando pri la grado de lego- kaj skribo-kapablo estis kreataj konceptoj de „funkcia literaciigo”. Oni kombinas la instruadon de la skribo-kapablo kun la instruado de iu fako. La – limigita – celo en unua paŝo nur plu estas havigi legokapablon sur tiu limigita kampo. La kunteksto kun la profesia trejnado komprenigu al la lernanto la gravecon de la skriboinstruo.

## En propra lingvo

Samtempe al tiuj novaj konceptoj akriĝis la konscio pri la graveco de la instruata lingvo. Pli kaj pli kreskis la deziro instrui en propra, en afrika lingvo. Tio tamen kaŭzas aron da problemoj. En multaj afrikaj ŝtatoj ekzistas tre multaj diversaj lingvoj kaj dialektoj, parte kun relative malgranda nombro de parolantoj. Krei la bezonatan instrumaterialon estas

### Kudia nekugaywa kwako

Kuze kufai ahiale aphile umuntu umele kudia futi anase. Lokudia leakudloko kusinika emandla futi kwente sikhona kuhamba, sidabanga nafula sidiale, inyama, emozambane, koweni, sinkhwa, shukela emaheni, emacandra nekubisi-ko nkhe kakudia lokubumba kahle umfimba. Kusigama siphile kahle futi sinemanda, Shukela lomnyenti, kakhulu uya mkhuluphala umuntu.



Ekzemplo por tradukita fakliteraturo, la libro „Malkovru vian korpon” aperis en ok afrikaj lingvoj.

kosta afero, ĉar la merkato por tiulingvaj produktoj estas malgranda; jen problemo, kiun alfrontas ĉiuj „malgrandaj” lingvoj, ekzemple ja ankaŭ Esperanto. En afrikaj ŝtatoj tamen aliaj faktoroj kunefikas: Efektiviĝi instrumaterialon nur en la pli „grandaj” afrikaj lingvoj signifus malegalecon, kiu povas kaŭzi rivalcon inter la diversaj etnoj de ŝtato. Konsiderante la malstabilan ekvilibron inter triboj, etnoj, popolgrupoj



Kelkaj infanlibroj publikigitaj lastatempe en afrikaj lingvoj en Sudafriko.

en multaj afrikaj ŝtatoj, la politika dimensio de la problemo fariĝas evidenta. Oni pensu nur pri la ankoraŭ brulanta milito inter arabaj kaj nigraj sudananoj, pri la milito en Etiopio, precipe en ties apudmara parto Eritreo, kaj multaj aliaj kazoj.

### Praktika argumento

Kelkaj lingvoj nur ĵus aŭ eĉ ankoraŭ ne fariĝis skribaj lingvoj. Aliaj havas diversajn alfabetojn, ekzemple araban kaj latinan. Ofte tial la situacio de la lingvo mem estas ankoraŭ malstabila. Fine la eŭropaj lingvoj malfermas la aliron al la teknika scio de la mondo, kiu ŝajnas forta „praktika” argumento. Multaj afrikaj intelektuloj ilin pro prestiĝaj kialoj preferas. Bone majstri la „modernajn” lingvojn malfermas la pordon al pli altaj sociaj tavoloj. Ĉu do rezigni pri afrikaj lingvoj pro politikaj, ekonomiaj, lingvaj, praktikaj, sociaj kaŭzoj?

En la Sudafrika Respubliko oni decidis, ke ne. Malgraŭ la – kompare kun eŭropaj landoj – malfacila lingva situacio de la lando oni klopodas efektiviĝi la rajton je baza instruado en la gepatra lingvo.

La lando havas du oficialajn lingvojn, la anglan kaj la afrikansan. La afrikansa evoluis el la nederlanda de la 17a jarcento. Krom tiuj du ekzistas ok ĉefaj „nigraj” lingvoj: la zulua, ksosa, svazia, sud-sotoa, nord-sotoa, tsvana, ŝangana kaj vendaa. Krome oni parolas pliajn gepatrajn lingvojn, kaj afrikajn, ekzemple la ndebelan, kaj eŭropajn, ekzemple la portugalan aŭ germanan, kaj hindajn, ekzemple la tamilan, hindian, urduan kaj aliajn.

### Rakontoj el la Biblio

La unuaj libroj en afrikaj lingvoj en suda Afriko datumas de la komenco

de la 19a jarcento. Temis pri rakontoj el la biblio kaj di-servaj temoj, produktitaj de misiistoj kun la celo „kristanigi” la afrikanojn. En la komenco de nia jarcento aperis la unuaj literaturaj verkoj, precipe en la ksosa kaj en la sudsotoa. Poste sekvis rakontoj kaj poemoj en aliaj lingvoj.


La aktuala kultur-politiko de la sudafrika ministrejo pri edukado deiras de la starpunkto, ke la evoluo de legkapablo en la gepatra lingvo estas necesa por doni al la infanoj la bazan kapablon bezonatan por pli poste majstri ankaŭ aliajn lingvojn. Ĝi tial kreis „projekton de lerneja biblioteko”, laŭ kiu 7200 publikaj primaraj lernejoj ricevu bibliotekon kun infan-, instru- kaj man-libroj en la ok nomitaj afrikaj lingvoj. Speciala komitato de la eduka ministrejo konsistanta el oficistoj kaj instruistoj de la koncernaj lingvoj en kunlaboro kun la respektivaj lingvo-konsilioj de la ok afrikaj lingvoj decidas pri la aĉetotaj libroj. Verkojn skribitajn originale en la respektivaj lingvoj oni preferas al tradukoj. Se – precipe en la pli malgrandaj lingvoj, kiel la venda aŭ tsvana – ne ekzistas sufiĉe da taŭgaj originalaj verkoj, oni ankaŭ akceptas bonajn tradukojn, laŭeble el aliaj afrikaj lingvoj aŭ el la angla aŭ afrikansa. Krom tradiciaj konataj fabeloj, popolaj rakontoj kaj fabeloj, kiuj en ĉiuj lingvoj ofte havas universale kompreneblan mesaĝon, lastatempe ankaŭ aperas pli kaj pli modernaj, nuntempaj rakontoj el la urba ĉiutago, la tiel nomataj „Soweto-rakontoj”<sup>1</sup>.

### Baza edukado


Por ŝpari kostojn, oni – parte en kunlaboro kun eksterlandaj eldonejoj – produktas libro-seriojn kun la samaj originaj ilustraĵoj, sed kun tekstoj en la diversaj naciaj lingvoj afrikaj. Eldonejoj de por-junularaj libroj lastatempe kreis diversajn literaturajn konkursojn pri infanlibroj en afrikaj lingvoj ekzemple la „D-ro M.J. Madiba-premion” por infanlibroj en la nord-sotoa.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj jam ekzistas rimarkeblaj sukcesoj survoje al la politika celo „baza edukado en la gepatra lingvo” en Sud-Afriko. Kritikantoj tamen ne mankas. Ili asertas, ke la priskribita kultur-politiko nur servu por gardi la superecon de la „blanka” malplimulto super la „nigra” plimulto laŭ la konata principo „dividu kaj regu”. Vekante ĉe la nigraj infanoj la senton esti tsvano aŭ zuluo aŭ ksoso, ktp., la sudafrika registaro volus disigi la solidarecon inter ĉiuj nigraj sudafricanoj. Ofte afrikaj kaj


podilekgwana-kgudu



Ho na le mefuta e ntang 200 000 ya dipodilekgwana.



podilekgwana-nakalelelele



podilekgwana-tshukudu

„Malkovru insektojn” faklibro por elementaj lernejoj eldonita samtempe en ok afrikaj lingvoj.

precipe sudafrikaj intelektuloj tial estas ofendataj, se oni demandas ilin, al kiu popolo, al kiu tribo ili apartenas. Tia demando estus rezulto de abominda „tribisma” pensado forigenda, ili estus „sudafricanoj”: Forigo de la tribaj malsamecoj apartenus tiel same al la „liberiga lukto” kiel forigo de sociaj kaj seksaj malegalecoj.

Jen tikla demando por esperantistoj: Certe preskaŭ ĉiuj inter ni konsentas pri la homaj rajtoj je persona libereco kaj egaleco. Aliflanke multaj samtempe pledas por lingva kaj kultura egalrajteco, por la gardo de la lingvo kaj kulturo ankaŭ de „malgrandaj” popoloj. Ĉu la unua nur estas atingebla je kosto de la dua? Ĉu la klopodoj efektiviĝi bazan instruadon en la gepatra vere nur estas maligna ruzaĵo por disigi kaj malfortigi la reziston de subprematan parton de la popolo? Aŭ ĉu tiu kulturpolitiko male efektivas homan rajton? Kiel esperantisto oni ne povos eviti respondon, eĉ se ĝi certe estos malfacila.

Bernhard PABST kaj  
Japie SPOELSTRA

Ĉiuj ilustraĵoj el „Suid-Afrikaanse Panorama”.

1. Soweto [Soŭeto] estas la angla akronimo por „sud-okcidenta antaŭurbo”, granda urbo por afrikanoj apud Johannesburgo.

## Esele sebakeng sa Ngwana Morena



Christopher Gregorowski

Via Afrika Limited

Sud-sotoa traduko de la anglalingva rakonto „Kial oni elektis azenon” de Christopher Gregorowski.

# Rasismaj tendencoj en eks-Sovetio

Subite interlingvistiko iĝis unu el la plej decide-gravaj sciencobranĉoj en la diversaj landoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KŜŜ). Pri tiu temo kunlaboranto de MONATO intervjuis rusan lingviston Sergej Kuznecov.

**MONATO:** *Kia estas nuntempe la lingva situacio en eks-Sovetio?*

**KUZNECOV:** Antaŭ la disfalo de Sovetio interlingvistoj trankvile esploris, analizis en siaj pagataj akademiaj postenoj. Nun, elirante el siaj kabinetoj, ili vidas krizon kiu akriĝis je sanga danĝero: oni persekutas homojn ĉar ili parolas malsaman lingvon.

**MONATO:** *Ĉar ili apartenas al alia etno...*

**KUZNECOV:** Aperas naciismaj, eĉ rasismaj tendencoj. Ekzemple, miaj plej ŝatataj amikoj vivas en landoj kiuj enkondukis diskriminaciajn lingvajn leĝojn: temas pri la baltaj ŝtatoj. Malgraŭ ke tiuj leĝoj celas favori la estonan, latvan, litovan lingvojn, mi devas diri ke ili malutilos unuavice al la baltaj popoloj mem.

**MONATO:** *Kial?*

**KUZNECOV:** Ĉar tiuj malmoralaj leĝoj koruptos la ĉef-etnon mem, igos ĝin perdi la moralan valoron de toleremo kaj de respekto al alieco. Kio komenĉiĝis kiel batalo por lingva plenrajtiĝo, naskas sensencan perforton. En Estonio jam okazis perarmitaj konfrontiĝoj. Junuloj staras kontraŭ junuloj. La situacio estas tia, en diversaj lokoj de eks-Sovetio, kian oni neniam antaŭe imagus: anstataŭ lingvaj konfliktoj, eksplodis jam bataloj rekte rasismaj.

**MONATO:** *Ĉu ankaŭ eks-Sovetion vizitadas la fantomo de "etna pureco", abomena principo jam aplikata en eks-Jugoslavio?*

**KUZNECOV:** Ĉiu ekskludema ideologio, kiel naciismo, povas konduki al tiaj ekstremoj. Naciismoj paralele disvolviĝantaj fortigas unu la alian: rememorigante la „glorajn momentojn” de la rusa pasinteco, la rusa patriotisma-naciisma asocio Pamjatj revokas iamajn batalojn kun aliaj popoloj, kaj tiel vekas ĉe tiuj similajn sentojn kontraŭdirektajn. Pripensu ke 60 milionoj da eks-sovetianoj devenas el miksaj familioj! Al kiu ili nun apartenu? Certe, ĉiu etno havu siajn rajtojn, sed por neniu estu devigo difini sin kiel anon de unu aŭ alia etno! „Sen-etnanoj” devas esti egalrajtaj.

**MONATO:** *Sed ĉu tiu postulo, tiu argumento ne povas subteni en ies buŝoj grand-rusajn strebojn? Multaj el tiuj „sen-etnanoj” estas ne-ruslandanoj parte rus-originaj, kies defendon Rusio povas pretendi.*

**KUZNECOV:** El ĉio povas iĝi ĉio, sed, klare, la principo de egalrajteco estas respektenda.

**MONATO:** *Tamen, konkrete: kiujn defendos Rusio, en okazo de bezono? La rusa registaro ja montras sin konscia pri tiu problemo.*

**KUZNECOV:** Parenteze: la konsiston de la rusa registaro pravigas neniu popola elekto. Sed, pri la subpremitaj popoloj: se oni ne defendas ilin, se la rusa registaro ne surprenas la rolon de protektanto, tiam formiĝos memdefendaj teritoriaj grupoj, kiel ekzemple tiuj jam batalantaj en Trans-Dnestrio kontraŭ la fortoj de la moldavia registaro. La tendenco al memprotektado kaj sin-armado povas nur pliakrigi la konfliktojn.

**MONATO:** *Kion interlingvistiko povas kontribui en situacioj kie jam la ekuzo de armiloj minacas?*

**KUZNECOV:** Ĝiaj analizoj helpas demonstri la lingvajn facetojn de konfliktoj. Ni prenu ekzemplon. Iuj asertas ke la mez-aziaj islamaj popoloj volas rehavi siajn antaŭajn, necirilajn, alfabetojn. Tio estas mito. Kompreneble, estis terura perdo por ili ke post la sovetigo ili ne plu povis legi la Koranon, kompostitan en la malnova alfabeto – sed nun estos same terura perdo se ili ne kapablos legi la eldonajnaron de la sovetia epoko, kvante multe pli signifan! Minacas nova senalfabetigo. La false naivaj asertoj pri la sopiro al tradicioj kaŝas la socio-lingvistikan fakton ke nova elito grimpas supren: homoj el la malvastega tavolo de tiuj kiuj scipovas legi la iaman alfabeton. La troigita radikalismo de ĉi tiuj potenc-aviduloj – laŭ mi bolŝevistoj sen komunismo – rezultigos socian misselektiĝon.

## „Anstataŭ lingvaj konfliktoj, eksplodas bataloj rekte rasismaj.”

**MONATO:** *Kiel povas rilati la Esperanto-movado al ĉio ĉi?*

**KUZNECOV:** Kiam pliakriĝas la politikaj konfliktoj, Esperanto ne prezentas solvon per si mem, ĝi nur proponas modelon.

**MONATO:** *Sed kiu atentis pri tiu modelo de tolerema mondo?*

**KUZNECOV:** Malmultaj. Tamen, ĝia neŭtraleco povas allogi.

**MONATO:** *Kiel reagas individue la movadanoj en la novaj situacioj?*

**KUZNECOV:** Kiel unuopuloj, la homoj konservas siajn esperantistajn amikajn rilatojn, sed kolektive ili emas adaptiĝi al la etoso reganta en ilia lando. Mi aldonu ke en eks-Sovetio Esperanto prezentiĝas kiel tre taŭga solvo por unu aspekto de la lingvo-problemo. Nome, ekde kiam la civitanoj rajtis vojaĝi, finiĝis la periodo de lingva aŭtarcio<sup>1</sup> en Sovetio. La fremdaj lingvoj eniras la ĉiutagojn de ĉiuj. Kaj, jen: se iu vojaĝas eksterlanden, Esperanto pli facile havigas al li la necesajn kontaktojn, kaj pli rapide la necesajn lingvoscion. Tiaj aferoj kreskigas la intereson de la publiko! Lastatempe eĉ multaj lingvistoj, nun jam pli oftaj vizitantoj de internaciaj konferencoj, eksentis la mankon de sufiĉa praktika lingvoscio...

ERTL István

1. Aŭtarcio: stato de ŝtato kiu volas sin limigi al konsumado de propraj produktoj.

## POEZIO

### „Nova sento”

Antaŭ kelkaj jaroj, ukrainia kunlaboranto de MONATO, Viktor Pajuk („Araneo”) sendis leterojn al korespondantoj en pluraj landoj kaj lokoj, petante tradukojn de fama poemo de la ukrainia nacia poeto Taras Ŝevĉenko: *Zapovjĵit* (Testamento).

La rezulto estis belega kompilaĵo, kiu aperis libroforme en 1989 kaj enhavas versiojn en multe da lingvoj sovetiaj kaj eksterlandaj, inkluzive de Esperanto.

Nun li kaj lia asocio intencas eldoni iom similan plurlingvan kompilaĵon, kiu konsistos el tradukoj de la fama poemo *La espero* de L.L. Zamenhof. La redaktoro de tiu ĉi rubriko jam tradukis ĝin en sian gepatran skotgaelan lingvon, kiu ne kutimas uzi rimojn. Jen, ekzemple la unua strofo: *Thàinig léirsinn nuadh air an t-saoghal Troimh an domhan cluinnear gairm làidir, Is air sgiathan na gaoithe aotruim’ Théid am fios bho àit’ gu h-àit an dràsda.* (En la mondon venis nova sento,

Tra la mondo iras forta voko;

Per flugiloj de facila vento,

Nun de loko flugu ĝi al loko.)

Kiu estas preta kunlabori per tradukaĵo en sia lingvo, bonvolu sendi ĝin al: Viktor Pajuk, ab.k. 83, UKR-282004 Ternopil, Ukrainio. GMA

# Umberto Eco pri tradukado kaj estonteco de Eŭropo

La kunlaboranto, kiu en *MONATO*, 1992/7, p. 25 (Umberto Eco pri lingva ĥaoso kaj estonteco de Eŭropo), raportis pri intervjuo kun la fama verkisto kaj semiologo Umberto Eco [Eko], ĵus ricevis reag-leton de italdevena leganto, kiu estis profesoro pri tradukado en prestiĝa eŭropa universitato. La korespondanto milde riproĉis la raportinton pro la fakto, ke li, laŭŝajne, donis la misan impreson, ke Eco montris malamikan sintenon vidalvide al Esperanto.

Laŭ informo de la itala leganto, kaj kelkaj detaloj pli-malpli bazitaj precipe sur artikolo en *L'Espresso*<sup>1</sup>, Umberto Eco refoje publike esprimis siajn pensojn pri lingvoj (inkluzive de Esperanto) kaj la estonteco de Eŭropo. Aludante al la jara kunveno de la itala asocio de semiologiaj studoj, kiu pasintjare okazis en Venecio kaj temis pri tradukado, kaj ankaŭ en la kunteksto de decido establi ĉe la universitato de Bolonjo, doktorecon pri tradukarto, Eco, citante la titolon de nova revuo *Translation and Literature* (Tradukado kaj literaturo), eldonata en Glasgovo (Skotlando), asertas, ke tiu titolo povus esti signaldiro aŭ slogano de nia jardeko. Kvankam Sankta Jeromo, jam siatempe, diskutis pri tradukado, nun estas aparte laŭmoda la temo. Oni povus nomi ĝin „la spirito de la epoko”.

Je la fino de la 18a jarcento, iu Degerando, verkis libron pri semiotiko (t.e. scienco pri signoj kaj signifoj), *Des signes* (Signoj), kiu aspektas surprize moderna. En ĝi, la aŭtoro demandas, ĉu eblas enkonduki iun internacian lingvon. Pro iom strangaj kaj nekonvinkaj argumentoj, li kontraŭstaras la ideon, sed tamen, Degerando komprenis, kiom grave estas kompreni, kion diras parolantoj de aliaj lingvoj, kaj rekonis, ke lernado de fremdaj lingvoj ne estas afero mekanika kaj senutila, kiel opiniis liaj samtempuloj.

Sed hodiaŭ, ĉio ŝanĝiĝis. Neniu pretendus, ke unu lingvo iĝu superrega, eĉ se oni, pro oportuneco, uzas la anglan. Lastatempaj okazaĵoj montras, ke Eŭropo ne troviĝas survoje al lingva unuigo, sed inverse, survoje al multigo de lingvoj: oni parolas litovan, slovenan, ukrainian, katalunan, vaskan

(eŭskan), ktp. Tamen, oni povos imagi ankaŭ iun vehiklan lingvon uzeban en la eŭropa parlamento, en flughavenoj, en kongresejoj (kaj — asertas Eco — al mi konvenus se estus Esperanto), tiel malhelpante, ke ĉiu nacio baraktu por trudi sian propran lingvon. Sendube, en ĉi tiu kontinento, popoloj kun malsamaj kulturoj kaj lingvoj povos kunvivi nur se ili disvolvos ampleksan plurlingvecon.

Kompreneble, totala plurlingveco estas neatingebla idealo, sed gravos, ke oni komprenu tion, kion diros iu en, ekzemple, slovena lingvo, ĝuste ĉar li *pensos* en slovena, kaj tiu penso ne estas sama kiel tio, kion oni pensos en la angla lingvo. Jen kial la problemo de tradukado iĝas fundamenta. La Eŭropo de l' estonteco estos kontinento de *tradukistoj*. (Eĉ pli, ili estos bezonataj, se ni parolos pri la mondo ĝenerale: ne temas pri la demando, ĉu tradukado per komputilo estas pli disvolvita en Japanio ol alie, aŭ ĉu anglo aŭ franco havos pli da problemoj kiam li deziras kompreni kaj sin komprenigi. Se iu popolo volos konkeri la mondon, tion ili faros, ne trudante sian propran lingvon, sed danke al sia propra traduk-kapableco.)

Fakte, ekde la tempo de Sankta Jeromo ĝis hodiaŭ, oni ne klare komprenas, kio signifas traduki. Ni scias nur, ke ĝi ne signifas, helpe de vortaro, anstataŭigi vorton de unu lingvo per vorto de alia. Klasika anekdoto rakontas, ke iu volis per vortaro traduki la frazon „La spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta”, kaj la rezulto estis io simila al „La brando ardas, sed la viando estas putriĝinta”. Kompreneble, tradukado havas certan rilaton al vortoj, sed ankaŭ al kunteksto. Ekzemple, hodiaŭ oni multfoje diskutas, ĉu tradukaĵo devas orientiĝi laŭ la

fonto, aŭ laŭ la celo.

Vidu — diras Eco — mi klarigos. Supozu ni, ke en iu artikolo, aŭ en iu rakonto, ni dirus, „Mary estis knabino, kiu estis pli al kutimiĝinta vizitadi Montnapoleone ol Giambellino(n)”. Se ĉi tiu frazo aperas en rakonto pri Milano, la tradukisto devas klopodi komprenigi al angla aŭ al ĉina leganto, kion signifas — en Milano — viziti Montnapoleone. Tamen, supozu ni, ke mi skribus tion por komprenigi al italaj legantoj, kia estas Mary — kiu verŝajne loĝas en alia lando. Ŝajnas al mi pravigebla, ke usona tradukanto skribu, ke Mary sentas sin pli hejme sur Madison Avenue ol en Brooklyn (aŭ en Bronx). Se mia rakonto estus arta opero, la tradukanto certe ŝanĝus la fontan tekston, ne tradukante, sed inter-



pretante, okupante sin pri la celata fina spektanto. Sed, se la sama tradukanto devus redoni en alia lingvo la frazon „Tiu branĉo de lago Komo”, ĉu li ne rajtus skribi, „Tiu branĉo de Loch Ness”? — eĉ pli se li tradukus por britoj. Tiokaze, la tradukaĵo devus esti orientita en la direkto al la fonto. Kaj se ni volas traduki el teksto de Aristotelo, esprimon, kiu rilatas al, ekzemple, movo, sciante, ke la koncepto „movo” laŭ la nuntempa fiziko, estas tute malsama?

Ŝajnas facile, sed ne estas.

Garbhan MACAOIDH (kiu elkore dankas profesoron F. Gabbrielli pro la informoj kaj klarigoj.)

1. *Traduttori, l'Europa del futuro ha bisogno di voi* (Tradukistoj, la Eŭropo de l' estonteco bezonas vin), *L'espresso*, 11an de oktobro 1992.

## Astronomio por ĉiu

Ĉi tiu libro prezentas faktojn pri astronomio sen matematiko, en bona klara stilo. Ĝi rakontas unue la antikvajn mitojn de la ĉinoj kaj la helenoj, kaj prezentas multajn utilajn malkovrojn de ĉinaj astronomoj, malmulte konatajn en Okcidento. Sekvas rakonto pri la helenaj saĝuloj Aristarko kaj Hiparko, kiuj kalkulis la diametron de la terglobo kaj la distancon inter la tero kaj luno. Post la renesanco, Neŭtono, Koperniko, Keplero kaj Galileo antaŭenigis la scienccon. Krom interesaj historiaĵoj, la libro prezentas aktualajn informojn pri la tero kaj aliaj planedoj ĉirkaŭ nia suno, sed enhavas nenion pri fenomenoj ekster nia suna sistemo, kiel kvazaroj, neŭtronaj steloj, nigraj truoj kaj aliaj strangaĵoj, kiuj lastatempe estas multe diskutataj de sciencistoj. Tial la titolo de la verko devus esti fakte *Pri la sunsistemo* kaj ne *Pri nia universo*.

Kelkaj aliaj eroj estas iomete kritikindaj; ekzemple anstataŭ desegnaĵoj pri mitaj grekaj gedioj kaj antikvaj ĉinaj saĝuloj, mi preferus vidi mapojn pri lastatempe malkovritaj interesajoj kiaj la montaroj sur la dorso de la luno, la granda kanjono kaj la impona vulkano sur Marso, kaj la satelitoj kaj ringoj de Jupitero kaj Saturno.

La granda aerolito trovita en Jilin (antaŭe Kirin) en Ĉinio prave estas nomata la plej granda aeroŝtono, sed ne la plej granda aerolito, se la difino de 'aerolito' inkluzivas la ferajn meteorojn, kiel dirite sur p. 111. La aeroŝtono de Jilin pezas 1770 kg, sed fera ĉielkorpo falinta ĉe Hoba apud Grootfontein en Namibio pezas eĉ 66 000 kg!

Ĉu ankaŭ la „Evento de Tunguska”, okazinta en 1908 ne estas menciinda? La iridioriĉa tavolo inter la kretacea kaj la terciara tavoloj estas rimarkinda en ĉapitro pri la tero.

La formulo pri la distancoj inter la planedoj estas prave atribuita al Titius, anstataŭ al Bode kiel kutime en popularaj verkoj, sed estas notinde, ke ĝi validas nur ĝis la orbito de Urano, kaj tute ne rilatas al Neptuno kaj Pluto.

Oni ne parolu pri „la Venuso, la Marso, la Saturno” kaj tiel plu; Venuso, Marso, Saturno sufiĉas. Oni ja ne uzas la artikolon antaŭ propraj nomoj. Tamen ni parolas pri „la tero kaj la luno”; aliaj lunoj kaj kredeble aliaj teroj ekzistas.

La esprimo ‚promenadi’ por ekskur-

soj ekster spacoveturilo, estas angliismo; la usonanoj mem diras ‚ekskursoj’. Neniu kapablas promeni en la spaco.

Simpla eraro troviĝas sur paĝo 86. La diametro de Marso estas 6787 km, ĝia radiuso estas 3393 km.

Nu, la libro ne estis verkita por specialistoj. Kiel teksto facile legebla, belaspekta kaj sufiĉe malmultekosta, ĝi estas rekomendinda.

Robert ROBERTSON

Li Qiang: *Pri nia universo*. Tradukis el la ĉina Lin Caisheng. Eld.: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Beijing, 1992. 112 p. ISBN: 7-5052-0052-6. Prezo ĉe FEL: 90 BEF + afranko, ĉe UEA: 5,10 NLG + afranko.

## La homeco tralense

La ŝlosilo al tiu ĉi verko troviĝas jam sur la tria tekstopaĝo, kiam la aŭtorino liberigas sin el la ruinoj de sia domo, 1200 metrojn for de la eksplodpunkto de la hiroŝima atom-bombo.

„Miaj okuloj... trapikitaj de tro forta konsterno, estis nenio plia ol lensoj senemociaj,” ŝi konstatas. Ekde tiu momento ni kvazaŭ membras en televida skipo, kiu per tiuj lensoj dokumentas la okazaĵojn. S-ino Okada, 38jara skulptistino, nek juĝas nek trudas interpreton. Ŝi lasas la bildojn paroli. Tiu senpasia observado komprenigas al ni kelkajn verojn. Meze de la postbombaj hororaĵoj (ŝiaj lensoj fidele registras ties detalojn), ni renkontas ankaŭ la obstinan povon de la homoj resti individuoj, eĉ perdinte ĉion. El tiu eteta specimeno ni ekkomprenas, kiaj estis tiuj cent mil pereintoj. Ili egale povus esti niaj samurbanoj. Eblas tion senti kaj samtempe konscii ilian japanecon, kiun la libreto fidele spegulas per multaj detaloj.


Eĉ la soldatojn eblas simpatii. „La junuloj, al kiuj oni instruis nur vundi kaj mortigi homojn per fusilo kaj bajoneto, nun ŝajnis [prizorgi kaj konsoli la viktimojn] laŭ la solida, pura instinkto, kvazaŭ tio estus ilia denaska konvinkiĝo.” *Notoj el la Delto* tamen ne prezentas heroojn. Ĝiaj homoj estas plej ordinaraj, la aŭtoro neniel klopodis ŝminki ilin por sia kamerao; kaj ĝuste tio donas al la verko la forton de vereco.

La ekzisto de komuna homeco, universala parenceco, nuntempe ne estas nur bela teorio: ĝi estas morala imperativo. Eĉ tiuj, kiuj jam teorie agnoskas ĝin, pli bone ekkomprenos

ĝin post legado de tiu ĉi fluanta traduko de Konisi Gaku – kaj verŝajne samtempe aldonos kelkajn utilajn erojn al sia vortprovizo.

Mark FETTES

Okada Haru: *Notoj pri la delto*. Tradukis el la japana Konisi Gaku. Eld.: Japana Esperanta Librokooperativo, Toyonaka, 1992. Ilustrita. 90p. ISBN: 4-930785-34-0. Prezo ĉe FEL: 210 BEF + afranko, ĉe UEA: 12,30 NLG + afranko.



**Ĉiuj recenzitaj libroj estas aĉetablaj ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Ĉe FEL ne aldoniĝas imposto al la cititaj prezoj por libroj.**

### Represoj

Ĉe eldonejo Sezonoj en Jekaterinburg, Ruslando, reeldoniĝis la fama *Sendemandaj respondoj* de Kalocsay Kálmán. La broŝuro estas modesta (25 paĝoj) sed enhavas la interesajn kaloĉajajn vidpunktojn pri diversaj lingvistikaj aspektoj, kiel „La difina artikolo”, „Duoblaj konsonantoj”, „Virinaj nomoj”, „Kunmetitaj verboformoj” kaj – kompreneble – „-ata kaj -ita”. La unua eldono aperis en 1931, sed la verko ne perdis aktualecon. Prezo ĉe FEL: 90 BEF + afranko; ĉe UEA: 4,50 NLG + afranko.

Ne nur Kalocsay respondis. Ankaŭ de Lazaro Zamenhof en 1927 aperis *Lingvaj respondoj*. La sama nova rusa eldonejo nun reprenis tiun ĉi 54paĝan broŝuron. Ankaŭ ĝin oni povas epiteti modesta sed riĉa je enhavo. La temoj: Alfabeto, elparolo, akcento, interpunkcio, etimologio, kazoj, la artikolo, ktp. Prezo ĉe FEL: 150 BEF + afranko; ĉe UEA: 9 NLG + afranko.

# Eŝafodo<sup>1</sup>

de Alberto Franco

*„Kaj Kain parolis kun sia frato Habel; kaj kiam ili estis sur la kampo, Kain leviĝis kontraŭ sian fraton Habel kaj mortigis lin.”* Genezo IV,8

1. Ni rigardis ilin de malproksime. Ĉiu portis banveston kaj glason da ia likvoro en siaj manoj. Ni nur fusilon, venintan el lando de frosto, kaj milicikostumon el kiuj ni iam kolektis meze de dezerto. Ili loĝis la landon promesitan de la libro. Ni estis tie ĉar patrino naskis nin cis la plej sankta rivero, en punkto de duonluno. Ilin ĉirkaŭis fajrhoj kaj fajrmaŝinoj. Nin nur la senfina sablaro kaj la akuŝanta sunĉielo. Inter ili kaj ni regis miljara teruro, kiun nur la tondro de la fajro kapablis silentigi kaj reaperis kun la obskuro. Ili konis la ĝustan treton de niaj paŝoj, kaj iun tagon ili fariĝis proksimaj kun decido trafa.

La promeso hodiaŭ iĝis pli vasta sur nia propra angoro. En miaj sonĝoj mi ne pentris la morton tia; silentvuala, nigrobrula... Mi imagis nur tuŝon fridan, blankon de sablo, memoron de fulmo okula. Hodiaŭ mi kaj miaj fratoj falis frue sur la eŝafodon de nia propra lando, kun sola preteksto, ke ne ekzistis alie por pluvi.

2. De malekstere oni perceptis lian ĉeeston. Li skrapis livapiede la ternivelan metalan pordegon. Senutila voksigno, ĉar Maria jam dek kvin minutojn staris sub ĝi. Jen la sola ŝirmejo kiun li povis celi por fuĝi de la hororo subhoma. Nun ŝi eble troviĝas ie proksime sub li, tie kie la homoj talpe pluas por ignori la rezulton de praa skurĝado de la ĉielo kaj la tero.

Novan loĝanton oni ne akceptas sen-grumble. Apud ŝi aperis pliaj okuloj, hostilaj kvietpoze, sed ja la ŝiaj plej belis, same kiel en Sangkor, kie ili amaris unuafoje, kiam milito vipis por preteksti ilian unuigon. Nun kun intenso milda, kun lumo blinda, sed ne maltrafa.

Tiutempe parolo trois; kompreno fariĝis el sperto de faktoj, kaj li sekvis la dorson de siaj akceptantoj en la interon de kaverno infrahoma, metalamura tartaro<sup>2</sup>, kie oni pluu sen alia celo ol pli-malpli frua kadukiĝo.

Ĉu eblas amo sen ĉielo? Ĉu ne necesas suno por metafori pri hararo blonda kaj neĝo por pentri la blankon de

haŭto? Kio do eblas al vermoj en ŝtalo frida?

Ŝi proksimiĝis por kisi lin; varmis venton en lipoj vintraj, kaj frostis ponardo en la eno ventra. Tiuj okuloj de Sangkor belis por la lasta fojo, kiam lia staro iĝis ebena. Feliĉe, hodiaŭ la manĝo venis freŝa.

3. Li forfuĝis post tiuj okuloj kiujn li ĉiam meritigis sed neniam havis. Li kuris, kiel ĉiuj homoj, post sonĝo kiun li sopiris rekapti. Li revis pri ĉio inta, eĉ se ne memoris; ĉar nur paseon li posedis. La nuno kaj la estonto vanuis antaŭlonge sur la batalkampoj, kie la krioj de la sufero homa ritme harmoniis kun la blovo de la pafoj tondraj. Kadenco kiun nur venĝoplana dio povis elpensi.


La armea juĝistaro, estaĵoj el sangoŝvita sablo, ne povis kompreni la kialojn de homo ajna. Kiel filozofiumi per kovardo! Ĉu afekti frenezon por liberiĝi de la fuzilieroj?<sup>4</sup>

Ili firme kredis je la efiko sorĉa de uniformo, je la perforta ido kiun ĝi kapablas akuŝi kiam oni traboras la unuan haŭton, je la perfekta soldato kiun ĝi spronas post la gustumado de la nutrivaj kotflakoj, je la reliefo kiun ĝi atingas ebenigi...

Li forkuris post sonĝo, kaj taĉmento forkuris post li. Ĉiuj homoj kuras post io. Haltas kiuj unue atingas sian celon. Kriis la kugloj kaj haltis ĉio. Kia silento. Ŝajnas, ke mi ne plu trovos vin...

4. Li konstatis ke venis jam la definitiva tago. La deteno tuta de lia ĉambro mildigas la koŝmaran aventuron de jus spertita punkto. Nova mateno iĝis kaj vid-al-vid' al la plafono li atendu kun rezigno la definitivitan sonon de vekhorloĝo, kiu damne memoros pri la kruela segmentiĝo de la vivo onia, de la vivo lia.

Ĉu eĉ unu sekundon la tempo ne povos atendigi? Kvazaŭ donace, la tempo lin respondas. Antaŭ la definitiva bato horloĝa, okazis ĉe liaj okuloj la sinsekva bildiĝo de ĉiuj formoj kaj enhavoj kiuj estigis lian punktan travivadon: faroj ontaj ankoraŭ ne okazintaj,



okuloj intaj eble ne plu ripetiĝontaj. Mem lia tuta ekzisto ludis premiere por li, sola spektanto, kiel en la lasta sekundo de onia ekzisto.

Ŝteleniris da lumo. La tago iĝis. Sonis metala vekiĝo-o. Jen venis la definitiva tago. La sopirita tago de lia maturiĝo. Li fieru. Li senmakule memoras la planon. Li prenas la foton kaj la pistolon. Malantaŭ la kazerno. ĝuste je la kvina posttagmeze.

5. Ĉiuj marŝis akompane al lia eŝafodo, sed nur senvizaĝa ekzekutisto kaj li grimpis tien. Poste venis la momento kiam homo devas sola ekrigardi la transan segmenton de sia malekzisto, kiam homo devas adiaŭi la mildon de la okuloj intaj ne plu ripetiĝontaj.

Ne gravis ĉu strangole, gase, elektre aŭ pafe. La homoj jam decidis pri teatra murdo de la homoj, kaj ĉiuj spektis la sesion kvazaŭ trejniĝe por sia propra morto.

Li ne memoras ĉu li sidis aŭ atendis stara la tuŝon de la frida mano, ĉu la homo senvizaĝa ŝarĝis aŭ ŝaltis la morton, ĉu ĝi estis ŝnura aŭ simple flarebla. Li memoras nur ke li mortis ne en unu sola loko aŭ tempo, sed ĉiam kaj ĉie samtempe. Fakte li ankoraŭ mortas. Eble ĝuste nun.

1. Eŝafodo: podio sur kiu oni ekzekutas.

2. Tartaro: abismo kaj punloko en Hadeso.

3. Vanui: malaperi.

4. Fuziliero: fusilisto.

de Gilbert Ledon

# Valsado en Vieno

Post la forpaso de ĉi tiuj vintraj monatoj (jes vintraj, ĉar ne nur la norda hemisfero devas esti la konstanta referenco por nia mondo) decas, ke ni iom meditu pri la kongresaj okazintaĵoj.

## Komuna eŭropa domo

Renno inter Francio kaj Germanio apenaŭ landlimas. La stampoj feliĉe malaperis, doganistoj kaj policistoj ne montriĝis. Same inter Germanio kaj Aŭstrio la kelkaj soldatoj aŭ oficialaj deĵorantoj el kiu ajn ŝtato aspektis pli folkloraj ol nepre bezonataj oficistoj. Mi petas pardonon al Vinko Oslak, ni, dum niaj veturadoj ne sukcesis distingi la apartecon de etnaj valoroj ĉe ĉeĥoj, slovakoj, kroatoj, slovenoj, madjaroj... la ciganojn (romaojn) ni ja rekonis pro la tendoj, sed kiuj ne nomadas, tiuj ne fremdas en la komuna domo. Komuna domo ne estas nur eŭropa, s-ro Ian Jackson! La homaj valoroj estas ekvivalentaj en la tuta mondo eĉ kiam la homoj de l'eŭropa komunumo ne emas diri jes, ĉu ne? Ne ekzistas subjektiva fataleco sed obskura mensostato en loka fermiĝo, kie la animalo-homo ne kapablas vidi horizonton pli vastan ol tiu, kie la suno ĉiutage subiras. La suno subiras same, ĉiutage, ĉie en nia mondo; tiu sama unika suno ne kulpas pri la siblado de l'homaj kugloj kiuj boras niajn korojn, ĉe ĉiuj horizontoj; la homoj jes kulpas.

## La tago de l' libro

Estas ĉi tio, kion mi klopodis diri en kvin minutoj dum la prezento de miaj eldonaĵoj. La moderna slovena novelaro estis prezentita, la antologio de l'serba parola literaturo ne. Amare sed gratule al mi, plendis profesoro Zivko Ivanoviĉ; ĉu ĉi tiu simpatia serbo (eble) ne kunportis same lirikan kaj epikan poezion? Povas esti ke malfacilas esti sloveno en Italio, kara Anita, sed tre facilas esti mondcivitano en iu ajn parto de nia globo. Estas afero de simpla homa volo. Estas afero de lokigo de Esperanto en unua loko, Uwe Moritz. Vi pravus, la monstraj ŝtatoj



detruas la spontanajn valorojn (ankaŭ la etnajn) por servi al apartaj intereso, sed la kulturaj valoroj estas sennaciecaj, la kulturlingvo Esperanto, kapablas konservi tiujn valorojn. Ni ĉiuj en Vieno, tion povis konscii. Ne konsciis, kiu ne volis.

## Dum balado

La balo dum la kongreso estis sukcesa kvankam la laŭleĝaj laborhoraroj limigis la etoson. La elasta planko de l'dancejo eltenis la kadencojn de l'ritmoj kvankam mi (kiel konstruingeniero) timis eventualan resonancon! Pli bonan resonancon ni sukcesis ĉe nia tablo kie kuniĝis francoj (kun Maurice), brazilanoj, aŭstroj (kun Max) kaj aliaj mondcivitanoj fronte al bonaj glasoj da ruĝa (sed ne sanga) vino el Aŭstrio mem por ĝuste senti la ekvivalentecon de l'vino, kiun la homoj ja produktas ĉie en la mondo. Neatendite; fronte al la ĵaluzemaj okuloj de mia edzino, relative juna knabino el Estonio konsultocele invitis min al valsado. Valsadis ŝia angoro. Ŝi ne sciis, kiajn valorojn transdoni al sia fileto, ĉu la germanaj de sia deveno, ĉu la rusaj de multjara vivado, ĉu la nunaj estoniaj? Karulino, al niaj idoj ne gravas la valoroj, ili naskiĝas nudaj, sen etnoj, sen

religioj, ne gravas la lingvoj, niaj idoj naskiĝas sennaciecaj. La ŝtateco sklavigas nin, la naciecon nur karakterizas subjektivaj flagoj aŭ vakuaj himnoj, la vera socia kadro estas la familio, kie ajn ĝi situas... unue Esperanton en ĉi tiu kadro, ĉio estas solvita ne nur por la loka kulturo kaj etnaj valoroj sed ankaŭ kaj precipe por nia reala tutmondeco. Ĉu vi pensas, ke tiam la homa sango ankoraŭ fluas, en Bosnio... Kroatio... Irlando kaj aliloke. Sed kiel komprenigi ĉi tion dum dancado? Kiel evidenti ĉi tion dum kantado, Mojsej Bronŝtein?

## Ni plantu niajn proprajn terpomojn

Vi tiom lerte esprimis tiun fundamentan fakton cele al la baldaŭa tutmonda ekonomia sociordo, kanzonisto Bronŝtein, ke via bardo restis reala ne nur por eks-Sovetio kun monata salajro de inĝeniero je 35 usonaj dolaroj sed ankaŭ por la kapitalistaj valsistoj de l'spekulado, kiuj ankaŭ devos planti siajn terpomojn. Mi tamen dubas ĉu ĉiuj komprenis viajn klarajn vortojn. Intertempe ni kantu kaj valsu... dum ni rigardas flui la mizeran sangon de l'obskurantismoj.



# Popolaj artoj

Andrzej Wawrzyniak estas diplomito de marista lernejo, finis studojn en en la fako pri internacia mara juro. Dum kelkaj jaroj li estis maristo, poste, dum 30 jaroj, diplomato. Li estas rekonata aŭtoritato pri orientalismo; invitata ofte lekciĝi ĉe landaj kaj eksterlandaj universitatoj. Krom tio, kiel arda amanto de la kulturoj de Azio kaj Pacifiko, Andrzej Wawrzyniak posedis signifa, privata orientalisman kolekton, kiun li en 1973 donacis al la ŝtato. Ĝi fariĝis la bazo por la samjare ekestinta Muzeo de la Arkipelago de Nusantara, kiu en 1976 fariĝis Muzeo de Azio kaj Pacifiko. En unu ĝia filio galerio „Nusantara”, Jerzy Fornal trovis lokon por sia Esperanta Teatro „Espero”.

En 1993 la Muzeo de Azio kaj Pacifiko (MAiP) festos la 20jariĝon de sia aktivado. Valoras konatiĝi kun ĝia unika kaj utila agado.

## Kio estas Nusantara?

Nusantara estas la plej granda arkipelago en la mondo; miloj da insuloj kaj insuletoj etendiĝantaj inter la azia kontinento kaj Aŭstralio. Kelkaj inter ili estas pli grandaj ol meza Eŭropa lando. Nusantara formas etnan, kulturan kaj pro tio ankaŭ historian tutecon. La plej grandaj ŝtatoj sur tiu teritorio estas Malajzio, Indonezio kaj Filipinoj. Loĝas tie centkelkdek milionoj da loĝantoj parolantaj amason da diversaj lingvoj. Elinter kelkaj miloj da lingvoj, kiujn konas la homaro, unu triono estas lingvoj de kelkcentoj da gentoj de Nusantara. Ligas ilin la komuna civilizo. Ĉi tiun loĝantaran mozaikon kunigas la malaja lingvo. Per ĝia simpligita formo interkompreniĝas ĉiuj popoloj de Nusantara, kaj tio estas decida faktoro de la unueco.

**MONATO:** Kio kaŭzis vian interesigon kaj fascinon pri Nusantara?

**WAWRZYNIAK:** Kiam mi estis 18jara la unuan fojon mi venis al Azio. La impreso estis granda kaj mi ligiĝis kun ĝi por la tuta vivo.


En la 60aj jaroj oni nomis min kultura ataŝeo de Pollando en Indonezio. Mi pasigis tie plurajn jarojn kaj konsideras ĝin la plej bela lando en la mondo, krom mia patrujo. Tial mi decidis okupiĝi pli profunde pri la komplekso de malajaj kulturoj. Kaj kvankam poste, kiel diplomato, mi laboris en aliaj landoj, Indonezio, en kiu mi pasigis 8 jarojn, absorbis min absolute.

**MONATO:** Kio diferencas tiun landon de la aliaj?

**WAWRZYNIAK:** Riĉega kulturo kaj superbaj homoj, kiuj por siaj amikoj estas pretaj fari ĉion. Amikeco estas ĉi tie konsiderata la plej alta etika kategorio. Nusantara estas mozaiko de kulturoj, sed karakteriza por ĝi estas malfermeco de ĉiuj por alia. En tiu lando ne evidentiĝas ekstremismoj; eĉ islamo, kiun karakterizas ia batalemo, estas ĉi tie milda. Specifa fenomeno por Nusantara evidentiĝas en tio, ke ĝi, dum miloj da jaroj, ensorbadis civilizajn kaj kulturajn valorojn de diversaj popoloj, formante surbaze de ili riĉan kaj tute apartan kulturon. Tavoliĝas ĉi tie influoj hindaj: budhismo kaj hinduismo; islamo, ĉina kulturo kaj elementoj de la



Teatra pupo, 50aj jaroj, Indonezio.




Religia statuo, bildo de Lamao Dzie Tsonghap, Mongolio.

eŭropa kulturo, kaj ĉio ĉi kunestas kaj formas eksterordinaran riĉecon. Alia valoro de tiu regiono estas toleremo religia kaj nacia. La karakteriza devizo kaj eco estas: Unueco en diverseco — *Bhinneka tunggal ika*. Tiu devizo troviĝas sub la blazono de la indonezia ŝtato kaj ĝi esprimas la tradicion pri kunvivado de popoloj sur tiu tero.

**MONATO:** Ĉu Pollando havas tradiciojn en popularigado de kulturo de Nusantara, kolektado de ĝiaj valoroj?

**WAWRZYNIAK:** Nur komence de la 70aj jaroj ekestis ebleco institucie okupiĝi pri ĉi tiu temo. Kvankam jam pli frue, fine de la 19a kaj komence de la 20a jarcento, agis tie polaj sciencistoj, precipe Marian Raciborski, fama botanikisto, profesoro de Jagelona Universitato en Krakovo, esploristo de java naturo. Lia kolekto el Javo kaj Kalimantanano (iama Borneo), en 1897-1900, estas la plej malnova en Pollando. Duan signifan kolekton faris Michał Siedlecki, natursciencisto kaj humanisto, rektoro de la vilna universitato kaj de la Jagelona Universitato en Krakovo. En 1908 li kolektis tre variajn artaĵojn el Javo kaj la insuloj de Java Maro. En tiu regiono vivis kaj kreis ankaŭ la pola pentristo Czesław Mystkowski, kiu mortis en Ĝakarto en 1938. Mia kolekto havas sian komencon en la 60aj jaroj kaj formas signifan kompletigon al la antaŭaj. Entute la kolektoj devenas de Javo, Sumatro, Kalimantanano, Bali, Sulavesi (iama Celebes), Okcidenta Iriano kaj aliaj lokoj.

En 1983 mi donacis mian kolekton al la ŝtato. Ĝi konsistis el 3000 eksponaĵoj, kiujn mi kolektis sur la insuloj de la indonezia arkipelago en la jaroj 1961-1971. Ekde tiu tempo venis pluraj donacoj de amikoj el pluraj



*Kruĉo „oftoba”, komenco de la 20a jc., kupro blankigita, Afganio.*

landoj, inkluzive de registaroj, sciencistoj, artistoj kaj diplomatoj.

**MONATO:** *Kiajn atingojn, krom la „signifa pligrandigo de la kolekto”, la Muzeo de Azio kaj Pacifiko povas noti?*

**WAWRZYNNIAK:** La muzeo estas tre aktiva rilate la popularigadon de la kulturoj el tiu regiono kaj pli vaste de diversaj landoj de Azio, Aŭstralio kaj Oceanio. La muzeo, krom havi ekspoziciojn, organizas seriojn de prelegoj, prezentojn de filmoj, muzikajn vesperojn, teatro-prezentojn, ktp., ankaŭ renkontiĝojn kun homoj kiuj povas prezenti ion aŭtentike interesan pri tiu temo. Dum 18 jaroj de sia ekzisto la Muzeo de Azio kaj Pacifiko aranĝis pli ol 350 ekspoziciojn en siaj du varsoviaj sidejoj: Galerio „Nusantara” kaj „Azjatycka” (Azia), kaj krome en dekelkaj aliaj urboj de Pollando kaj ankaŭ en Afganio, Ĉinio, Hindio, Lanko, Svedio, Tahitio, Tajlando kaj Vjet-Namo. Por la plejmulto niaj laborantoj pretigis katalogojn, kaj eminentaj polaj plastikistoj afiŝojn. El tiuj lastaj ekestis aparta ekspozicio: „La Oriento en afiŝoj de la muzeo de Azio kaj Pacifiko”. Ni vaste kunlaboras kun la lernejoj. Cele konigi al la junularo niajn kolektojn, la laborantoj de la Muzeo aranĝas lecionojn en niaj filioj kaj ankaŭ en la lernejoj, kaj prezentas pritemajn filmojn. Kiel tre gravan, ili opinias sian laboron en varsoviaj malsanulejoj, kie oni kuracas infanojn kun kronikaj malsanoj kiel ekzemple leŭkemio.

**MONATO:** *Mi aŭdis de la laborantoj, ke laŭ la kuracistoj, koniĝo kun belaj ekspoziciaĵoj, interesaj rakontoj pri forraj landoj kaj kulturoj bone influas la memfarton de la malsanaj infanoj.*

**WAWRZYNNIAK:** Se tiel estas, tio vere tre kontentigas. En la galerio okazas koncertoj, krome prezento de kutimoj; kiel ekzemple teo-trinkado, kaj

eĉ religiaj solenaĵoj de adeptoj de orientaj kultoj. La Muzeo de Azio kaj Pacifiko aktivas ankaŭ surkampe de orientalismaj esploroj; tiucele ĝi aranĝas sciencajn simpoziojn. En nia muzea konsilio troviĝas eminentaj polaj sciencistoj kaj artistoj okupiĝantaj pri la kulturo de la Oriento. La Muzeo de Azio kaj Pacifiko kunlaboras ankaŭ kun sciencistoj el aliaj landoj – ensume kun 80 organizaĵoj diverstipaj en la tuta mondo. Krom ekspoziciaĵoj vaste prezentantaj la kulturon de la regiono, kaj nombrantaj nun jam pli ol 13 000, la Muzeo de Azio kaj Pacifiko posedas azian bibliotekon kun 15 000 volumoj. Ni estas ankaŭ aktivaj en societoj, kiuj celas alproksimigi la polan socion al orientaj kulturoj. En nia sidejo, ĉe Solec 24, troviĝas la sidejo de la Pola-Nepala Societo de Amikeco. En 1990 la Muzeo eldonis la unuan jarlibron *Orient* (Oriento), kiu estis



*Skulptaĵo „Ekanamsa sursifiĝanta pavon”, 20a jc., ligno, Hindio.*



*Tamburo klepsidra, ligno kavigita, serpenta ledo, Papuo Nov-Gvineo.*

bone akceptita en fakaj medioj. En ĝi troviĝas publikaĵoj de sciencistoj el Pollando, Hindio, Britio, Italio kaj Usono. Bedaŭrinde, pro financaj malfacilaĵoj, ne eblas eldoni sekvajn kajerojn, kvankam jam estas kolektita por ili tre valora kaj interesa materialo.

**MONATO:** *Pollando travivas ekonomian krizon. Mankas mono por financi kulturon; draste malkreskis subvencioj por ĝiaj celoj. Kion vi faras por tradaŭri?*

**WAWRZYNNIAK:** Efektive, nun temas vere pri tradaŭro, tial ni penegas malgrandigi niajn financajn embarasojn. Ni vendas, en niaj filioj, orientalaĵojn kaj ĉi-temajn librojn. La laborejo de la muzeo reproduktas aziajn artaĵojn. Ĉe nia ĉefsidejo estis aranĝita enspeza parkejo... Tamen, ĉi-speca aktivado povas nur minimume malgrandigi nian malfacilan situacion, sed neniel solvi niajn problemojn. Tial ni restas en senĉesa timo ĉu sufiĉos por salajri nepran nombron de la laborantoj, kaj kio pri financaj rimedoj por la nepra konservado de la kolekto – elementa kondiĉo por ĝia ekzisto entute?

**MONATO:** *Via simpatio al Esperanto kaj kompreno pri ĝia rolo havas, kiel mi scias, personan fonon. Siatempo vi estis aktiva esperantisto. Ĉu via interesiĝo pri la kulturoj de foraj popoloj iel ligiĝas kun tio?*

**WAWRZYNNIAK:** Tutcerte. Esperanto formis por mi vojon por ekkoni la mondon kaj alkondukis al tiu starpunkto en kiu mi nun troviĝas. Post la 2a mondmilito, mi loĝis en Gdynia, ĉe-balta-havenurbo, kaj tie en la jaroj 1945-47 mi estis aktiva en la Esperanto-movado. Mi estis bonŝanca, ĉar instruis min sinjorino Edwarda Kaminska, tre bona kaj arda esperantistino, kiu nelonge post hejm-reveno el naziaj koncentroj komencis labori por disvastigi la lingvon kaj konatiĝo kun riĉegaj malnovaj civilizoj donis al mi la ŝancon lerni. Rezulte, mi estas malferma al la mondo; mi sentas min pli riĉa kaj pli feliĉa. En Azio mi fartas mirinde, ĉar per konatiĝo kun la kulturoj de la tieaj popoloj, kaj ankaŭ kun iliaj spiritoj mi havas ŝancon kompreni ilin. Mi ne sentas min homo de ekstere, kaj ankaŭ miaj amikoj el tiuj landoj tiel min traktas. Tio donas al mi eblecon, krom popularigi iliajn eminentajn kulturojn, fari ion pozitivan ankaŭ en aliaj sferoj.

Zofia BANET-FORNALOWA

P.S. Al tiuj, kiuj dezirus kontakti la Muzeon de Azio kaj Pacifiko mi donas la adreson: Muzeum Azji i Pacifiku, 00-403 Warszawa, il. Solec 24, tel. 29-67-24, 21-94-70, Pollando.

**UKRAINIO**

# Revenas vero kaj justo

1992 estis la jaro de la centjara jubileo de kardinalo Josip Slipij („Jozefo la Blinda”), patriarĥo de la ukraina grek-katolika eklezio. La tuta kristana mondo celebris tiun daton kaj precipe Ukrainio – lando, al kiu la pastro dediĉis sian tutan vivon, fervoron, spiriton kaj... korpon.

Slipij naskiĝis la 17an de februaro 1892 apud la okcident-ukrainia urbo Ternopil, en riĉa kamparana familio. La superan teologian klercon li ricevis en Lvovo, Insbruko (Aŭstrio) kaj en Romo. De la jaro 1929 li estis seninterrompe rektoro de la teologia akademio de Lvovo, kiun fermis la komunisma reĝimo en 1944. Plej terura jaro por la pastro estis 1946 kiam, pro lia rifuzo unuiĝi kun la rus-ortodoksia eklezio (kiun komplete manipulis la reĝimo), oni kondamnis lin al okjara punlaborado en Siberio. Okazis tiel, ke Slipij pasigis entute 18 jarojn de sia vivo en stalinismaj koncentrejoj, pro „krimoj kontraŭ Sovetio”. Nur danke al agado de famaj ŝtataj personoj, precipe de papo Johano 23a, la komunistoj finfine liberigis lin. En februaro 1963 li aperis en la apostola ĉefurbo Vatikano. Oni tie tre alte estimis lian agadon kaj post du jaroj papo Paŭlo 6a nomumis lin kardinalo. La nova kardinalo Jozefo multe aktivis en Vatikano, li konstruigis preĝejon dediĉitan al Sankta Sofio, multe laboris en la katolika universitato de Klemento, redaktis diversajn religiajn periodaĵojn.

La 7an de septembro 1984 Josip Slipij forpasis en Vatikano, antaŭe testameninte: „Entombigu min en nia patriarĥia katedralo de Sankta Sofio; sed kiam ... leviĝos nia sankta eklezio kaj nia ukraina popolo, transportu mian ĉerkon al la gepatra ukraina tero kaj metu ĝin en la preĝejon de Sankta Georgo en Lvovo.”

Pasis ok jaroj ĝis kiam Ukrainio efektive povis komenci liberiĝi de la komunisma jugo, kaj eblis plenumi la lastan deziron de la ukraina kardinalo. Jen, la 27an de aŭgusto surteriĝis en la Ivova flughaveno militista aviadilo, sendita speciale de la ukraina ministro pri defendo, Kon-



*Funebra procesio el la Ivova flughaveno ĝis la katedralo honoras al kardinalo Josip Slipij.*



*Kardinalo Josip Slipij, kies korpon oni translokis al Ukrainio.*

stantin Morozov, por alporti la korpon de la multon suferinta pastro. Alfluis miloj da kredantoj, ne nur el la katolika Ukrainio – ĉefe la okcidenta parto de la lando – por bonvenigi la korpon, sed ankaŭ el Usono, Kanado kaj okcidenta Eŭropo. La solenan honorigan ceremonion partoprenis i.a. la ukraina ŝtatprezidanto, Leonid Kravĉuk, la 94jara patriarĥo de la ukraina ortodoksia

eklezio, Mstislav, la papa nuncio en Ukrainio, kaj ambasadoroj de Usono kaj Rumanio. La ceremonion estris la nuna ĉefo de la ukraina eklezio, kardinalo Lubaĉivskij.

Sed la entombigo en la kriptoj de Sankta Georgo ne povis okazi kiel planite, ĉar tiom multe da homoj deziris lastfoje saluti sian pastron, ke oni devis forŝovi tion ĝis la 7a de septembro.

Araneo

**MUZIKO**

**Barbirej-kantado**

Kvaropa „barbireja” kantado estas usona artformo, kiu evoluis en la tieaj antaŭepokaj barbirejoj kaj en Britio, kaj la pli fruaj formoj de senakompana kantado en malgrandaj grupoj (ekz. madrigaloj). En la tridekaj jaroj fondiĝis societo por konservi kaj kuraĝigi kvaropan barbirej-kantadon en Usono. Tiu societo aranĝas ĉiujaran kongreson en Usono, kie miloj da adeptoj konkuras por trovi la plej bonajn kvaropojn kaj ĥorojn. Tiu konkurso estas strikte amatora.

Kio ĝi estas? Senakompana kvaropo de viroj (origine; sed nuntempe ankaŭ virinoj, kvankam ne ambaŭ kune) kantas en stilo de la 1890aj jaroj simplajn melodiojn. Ili estas plejparte similaj, faritaj per simplaj kaj per oftaj sepaj voĉkordoj, por produkti plaĉan ekscitan sonon pro la supertonoj, kiuj aperas kiam kvar voĉoj kantas perfekte agorditajn kordojn.

Ĉar ĝi estas tipe usona artformo, konkursantoj devas kanti usonangle, sed oni ankaŭ jam aranĝis kelkajn alilingvajn kantojn laŭ tiu stilo, ekzemple en Nov-Zelando per la maoria lingvo.

En la lastaj jaroj ne nur en angle parolantaj landoj, sed ankaŭ en Eŭropo aperis grupoj, kiuj volas partopreni en tiu movado. Monda Harmoni-Konsilantaro estiĝis en 1987 por faciligi kunlaboron inter la ekzistantaj landaj barbirej-kantadoj.

D.E. ROGERS

**CIFEROJ**

**Amatora kolektanto – vera esploristo**

Antaŭ nelonge, en rusa porjunulara revuo *Tramvaj* (Tramo) estis publikigita varbartikolo por infanoj pri Esperanto. Al kunlaboranto de MONATO oni donis unu el la reagaj leteroj: homo el Kaliningrad (nord-okcidenta parto de eksa Sovetio, eksa Königsberg) skribis pri sia ŝatokupo: li kolektadas la nomojn de nombroj – de 1 ĝis 10 – en ĉiuj eblaj lingvoj, kaj petis helpon de esperantistoj por pliriĉigi sian kolekton. La kolektanton MONATO intervjuis.

Jen kion diris Pavel Vasiljeviĉ Petrov el Kaliningrad pri si mem, pri sia laboro, kaj pri sia kolekto:

„Mi estas 29jara, mi laboras kiel tria meĥanikisto en administracio *Reftransflot* (frid-transporta floto), dum multaj monatoj laboras sur la maro. La kolekton de numeraloj mi komencis en 1975, tiam tio estis simpla knaba pasio kune kun kolekto de moneroj kaj poŝtmarkoj, sur kiuj mi, i.a. trovis unuajn specimenojn de numeraloj. La unua sperto de ‚explorlaboro’ estis deĉifrado de numeraloj sur bankbiletoj.

La dua ondo de kolekto okazis en periodo de 1980–85, dum la studentaj jaroj (mi lernis en kaliningrada alta inĝenier-marista lernejo). Tiam la kolekto kreskis ĝis 32 dikaj kajejoj, kie por ĉiu lingvo estis dediĉita aparta tabelo. Certe, plimulto da tabeloj restis ne plenigita.

Post la lernejo mi komencis labori sur la maro, kaj tio ege helpis min en la kolekto. En ĉiu haveno mi

vizitis la bibliotekon kaj tiamaniere la kolekto jam okupis 19 grandformatajn dosierujojn. Samtempe kreskis ankaŭ katalogoj (alfabetaj listoj de lingvoj kaj dialektoj, ktp.). La katalogo ruslingva de nomoj de lingvoj kaj dialektoj el la tuta mondo kalkulas ĉ. 27 mil nomojn.

Multfojaj provoj ‚reklamadi’ la kolekton tute fiaskis. Loĝantoj de eksa Sovetio ja ne interesiĝas pri kolekto! Sed interesan ŝancon ricevis la kolekto en 1989, kiam mi en Moskva biblioteko pri fremdaj literaturoj tute hazarde trovis adreson de biblioteko ĉe la melburna universitato en Aŭstralio. Mi skribis tien kaj responde ili sendis al mi numeralojn en pli ol 600 lingvoj de Aŭstralio! En 1991 mi similmaniere trovis adreson de ĉikaga universitato (Usono) kiu sendis liston de bibliotekoj de Nord-Ameriko. Mi sendis leterojn al 18 adresoj, kaj tuj ricevis respondojn el ses el ili. Tiel mi eksciis, ke ekzistas almenaŭ du ‚samideanoj’ kolektantoj de nombroj kaj ke en biblioteko de la parlamento en Usono ekzistas kolekto de numeraloj, kolektita en 1940 fare de Theodor Kluge. La kolekto de Karl Mastej (Saint Louis, Usono) nombras 3300 lingvojn kaj tiu de Sai Lam Chan (Hongkongo) 2700 plus 1000 lingvojn aŭstroneziajn en malnetaĵoj.

Kio rilatas al mia kolekto, komence de 1992 mi donis la jenajn informojn por la societo *Amici Linguarium* en Göteborg (Svedio): 4300 slipoj, el kiuj 1800 estas tute plenigitaj (de 1 ĝis 10) kaj proks. 2500 plenigitaj nur parte. Ekde tiam ĝi ankoraŭ kreskis ĝis 4600 (respektive 1900/2700). Nuntempe la kolekto konsistas el kartoteko, en kiu ĉiu lingvo kaj dialekto estas skribita sur unu aŭ kelkaj slipoj. Multaj lingvoj havas kelkajn (ĝis 30) kategoriojn de numeraloj, pro tio ofte por unu lingvo estas dediĉitaj kelk(dek)oj da slipoj!

Pri artefaritaj lingvoj mi nur komencas labori. Mi scias pri jam du aŭ tri dekoj da lingvoprojektoj, sed numeralojn mi havas en nur kvar lingvoj: Esperanto, Aksiom-Variant, Babmax kaj Polite.”

Kiu interesiĝas pri la kolekto aŭ povas havigi la 10 numeralojn en plia lingvo, skribu al Pavel Petrov, ul. Maŝinostroitelnaja 60–68, RUS-236011 Kaliningrad, Ruslando. NikSt



La novzelanda barbirej-kvaropo „Avon City Four”.

# enigmo kun konkurso

NE TENU GEMON KAJ MONON KIEL PLEJ ALTAN VALORON			MINERALON JARFINA SENTO DE LEGANTO	AKVUJON ORNAM- AĴON	FEMALE MAL- GRANDA ŜVELAĴ'	MALĈASTA SKRIBAĴ'	SUPER- FLUAJ VERBA FINAĴO	
			KVARRADA VETURILO				AROMARBA	
DENOVA ELEKT'	FORTA IMPRESO	BEST- ORNAMAĴE ARAB'			SURPRIZ- IĜOS AGOJ			
					FAJRUJA		NE TRE GRANDA UTILO	
M					PENTR- AĴOJN KAJ TEATR- AĴOJN			
PARADIZON					RESPOND' AKVOVOJO		KORTBIRD'	
MALSTARON				ŜLIM' BOMBONA		ŜTEL' RESTAS SUR SEĜO		
TRINKAĴON				FLEKSAS LA GENUOJN		M		
			ENDANGER- IGIS	AMFIBI'	MALSAN- ECAN BRUILO			
PAGIL'	PREP. POR ANTAŬ- TEMPECO	MOVAS SIN MALANTAŬEN RABO- BESTOJN				MALKUNE IU LITER'	GRAJNON	
M				ŜLIM'			KOMPOST- MAŝINON	
DANĜER- INKLINON						SUB RAJD- ANTO		
					SATAS HUNDO	M	PRON. 1000 (ROMIE)	ŜIRMILO
MAL- PARDON- EME	BLUZ' INAN ORGANON					BONODORA ARBED'		
				FĜKORBOJ FINVORTO			DISTINGIL' RESTAĴE	
PRUNTOS			ĤEMIA SOLVIL'		ENMETO	KOLEKTAĴ'	VIRKAPRO	
			LAKTUJ'			MOV' MAL- SUPREN		
ORGAN'		SICILIA URB' SUBJUNK- CIO				MALBON- VIDE		
B-AN PRIN- TEMPAJ FLOROJ				L.P.	SPICAĴ'			
						GASO		

Sendu la daŭrigon de la frazo, kiun vi trovos en la haĉitaj ĉeloj, antaŭ la 28a de februaro 1993 al MONATO (Enigmoj), Frankrijklei 140, B-2000 Antverpeno, Belgio.

**BONAN APETITON?**

Ruso, usonano kaj volapükisto vizitas restoracion, kaj la usonano mendas bifstekon. La kelnero diras: „Pardonu min, sed estas manko de bifsteko.” La ruso demandas: „Kio fakte estas ‚bifsteko’?” „Kio estas ‚manko’?” scivolas la usonano. La volapükisto diras: „Kio estas ‚pardonu min’?”



**AŬSTRALIA TURISTO**

Ĉarma trinkejo ie en Londono: kanguruo envenas kaj ĝentile mendas glason da biero, donante 100-pundan bileton al la baristo. Ĉi tiu fripono kompreneble konstatas ke bestoj ne scipovas kalkuli, do li donas la bieron al la kanguruo, kaj nur unu pundon kiel ŝanĝmonon. La kanguruo penseme trinketas la bieron, kaj metas la moneron en sian poŝon. La babilema baristo: „Sciu... oni malofte vidas kanguruojn en ĉi tiu trinkejo.” „Tio tute ne surprizas min,” akre respondas la marsupiulo, „se unu glaseto da varma biero kostas 99 pundojn!”



**ĈEVALA SAĜO**

Du farmistoj (volapükisto kaj idisto) havis po ĉevalon, sed ili tute ne povis rekoni la propran beston. Unu do fortranĉis la voston de sia ĉevalo, kaj dum iom da tempo ĉio bone iris. Tiam unu el la ĉevaloj perdis la voston en akcidento, kaj ekregis konfuzo. Ili do iras al la ĉefo de la vilaĝo – interlinguisto – por peti helpon. „Stultuloj!” li diras, „ĉu vi ne rimarkis ke la nigra ĉevalo estas dek centimetrojn pli alta ol la blanka?”




**TRANSPORTO**

Idisto kaj volapükisto hazarde renkontiĝas dum Universala Kongreso de Novial. „Ha!” diras unu al la alia, „Kiamaniere vi venis ĉi tien? Ĉu ŝipe, aŭ aviadile?” „Nu, tion mi ne scias,” respondas la alia. „Mia edzino aĉetis la biletojn.”



„Dorotea, kiel via nova hundo nomiĝas?” „Mi ne scias, sinjorino: mi demandis, sed ĝi rifuzas respondi!”



**PAROLI AŬ NE PAROLI**

Juna viro studas dum tre longa tempo por fariĝi aktoro, kaj finfine oni proponas al li rolon. Ĝoje li diras al sia patro: „He, paĉjo, mi ludos viron kiu havas edzinon jam dudek jarojn.” „Ne ĝenu vin, filo, iam vi ricevos parolan rolon!”



**ONI ANĜELAS ĈI TIE**

Viro mortas, kaj alvenas al la ĉiela enirejo. „Vi rajtas eniri nur se vi iam faris ion aparte kuraĝan,” diras sankta Petro. „Aparte kuraĝan, ĉu?” replikas la aspiranto. „Nu, mi aŭdacis paroli Esperanton dum Esperanto-kongreso.” „Kaj kiam vi faris tion?” demandas la scivolema sanktulo, iom ŝokite. „Antaŭ dek sekundoj!”



**INTIMA AMIKO**

Eterna komencanto alvenas hejmen multe pli frue ol normale kaj surpriziĝas kiam li vidas sian edzinon en la lito. „Kion vi faras?” li demandas. „Nu, nu,” ŝi diras, konfuzite, „mi he... jes, mi restas proteste en la lito ĉar vi rifuzis aĉeti por mi taŭgan robon por nia libertempo!” „Sensencaĵo!” respondas la amuzita edzo. „Jen en via ŝranko jam pendas multaj taŭgaj kostumoj. Ekzemple, jen la roza, la verda, la citrona... saluton, Jakobo... la nigra, la flava...”



**LERNEJAJ TAGOJ**

„Mikaelo, ĉu vi konas knabon kiu nomiĝas Antonio?” „Jes, paĉjo, li dormas apud mi en la lernejo!”



„Paŭlo, se vi havus unu dolaron en la maldekstra poŝo, kaj du dolarojn en la alia, kion vi havus?” „Nu, certe ies pantalonon, sed ne la mian!”



„Jenjo, kial vi ploras?” „Ĉar Eduardo rompis mian pupon.” „Kiel li faris tion?” „Mi batis lian nazon per ĝi!”



„Panjo, mi ne volas iri al la lernejo!” „Kial ne, mia filo?” „Ĉar ĉiuj infanoj mokas min, kaj ankaŭ la instruistoj kaj instruistinoj mokas min!” „Sed mi insistas ke vi iru al la lernejo, mia kara, kaj estas tre bona kialo por tio.” „Kiu kialo, panjo?” „Nu, vi ja havas kvardek kvin jarojn, kaj vi estas la lernejestro!”



**NOMENKLATURO**

Adamo kaj Eva rigardas la bestojn, kaj donas al ili nomojn. „Tio estas rinocero,” diras Eva. „Kial vi donas tian strangan nomon, rinocero?” „Nu, ĝi similas al rinocero, ĉu ne?”



*Nekredeble! Eĉ ĉi tie mi ĉiam forgesas mia akuzativo!*

## anoncetoj

Rulseĝon serĉas esperantistino-invalidino ekde infaneco. Helpu laŭ via ebleco! Ivanova Natalija Dmitrievna, 7-27-2, Krasnojarskij kraj, RUS-663131 Zesosibirsk, Siberio, Ruslando.

Kion ni faru por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? Informas: S-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. (Bonvolu sendi koverton kun via adreso kaj 2 francajn pm je 2,50 F aŭ 2 int. respondkuponojn.)

Ĉiun duan jaron okazas en Belgio multflanka kultura festivalo Europalia. En 1993 ĝia temo estas Meksikio. Meksikaj esperantistoj kaj aliaj kiuj havas fakan konon pri Meksikio proponu programojn al la kunordiganto, Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1700 Dilbeek, Belgio.

„La Nova Realismo” de Bruno Vogelmann montras la regulojn de la Nova Pensado, unuigo inter religio kaj ateismo, nova mondkoncepto. Prezo DM 25.- Mendoj el nepagipovaj landoj ĉe Bruno Vogelmann, D-W-Crailsheim, Germanio.

La 48a kongreso de SAT-Amikaro okazos de la 9a ĝis la 13a de aprilo en Hérouville Saint Claer, apud Caen, Francio. Informojn kaj aliĝilojn petu de Yves Nicolas, 17-37 Quartier du Bois, 14200 Hérouville Saint Clair.

Esperanto-domo en Nico, lazura marmobordo. Helpu al ĝia kreado aĉetante unu kuponon de po 100 FF., per kiu vi pagos restadon en Nico por unu nokto/du personoj en dulita ĉambro. Informas: NICE-Esperanto, Hort. 2, 121 Bld Napoléon 3, F-06200 Nice, Francio.

La gemembroj de Matadio Esperanto-Centro deziras korespondi kun la tuta mondo, pri diversaj temoj. Adreso: B.P. 211 Matadi I, Bas-Zaïre, Zairio.

La privata komerc-turisma firmao MARAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj. Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Viaflankaj demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 MARAN Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj\* (BEF) por unu linio (minimуме 240 BEF\*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

\*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.

## Ŝirpecoj

(anstataŭ monumento)



Christian DECLERCK  
FEL

„Senhonte erotikaj kaj senkaŝe aŭtobiografiaj poemoj kantas laŭ sekcioj ĉe kvar amatinoj... Ŝirpecoj antaŭ ĉio honeste atestas laŭ verso de la poeto mem, ke „Amo estas io vivanta, io vivata’.”

(el recenzo de Timothy Brian Carr).

La poemaro „Ŝirpecoj (anstataŭ monumento)” estas havebla ĉe ĉiuj bonaj libroservoj, aŭ rekte ĉe la eldonejo: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, kontraŭ 420 BEF + afranko (sama prezo por loĝantoj de Eŭropa Komunumo kaj por aliaj).

“Stafeto”-serio prezentas:

## Beletro, sed ne el katedro

Gaston Waringhien

Ĉu vere ekzistas esperanta literaturo? Ĉu eĉ ekzistas esperanta literaturscienco?

La nestoro de l' esperantaj literatur-istoj instruos, en agrabla, klara, prilaborita stilo, pri la atingajoj de esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Fakte temas pri simplaj klarigoj de altnivelaj artaj rezultoj.

Beletro, sed ne el katedro: (reviziita eldono de *Eseoj I*) 263 p., 630 BEF + sendokostoj. Mendu ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Donacinte monon al la


## ABONHELPA FONDUSO

de MONATO

vi helpas solidarece laŭ pluraj vidpunktoj:

- vi ebligas al esperantistoj en malriĉaj landoj legi ĉi tiun prestiĝan revuon;
- vi subtenas la Esperanto-movadon en tiuj landoj, ĉar ĝi per MONATO disponas pri konvinka propagandilo;
- vi altigas la nombron de l' abonantaro de MONATO kaj do helpas garantii ĝian daŭran ekziston.

Pagu rekte sumon por la **ABONHELPA FONDUSO** aŭ aldonu donaco-sumon, pagante vian propran abonkotizon! Cetere: ĉu via klubo aŭ grupo jam subtenas solidarece esperantistojn en tiuj landoj? Aranĝu kolekton, ekzemple dum Zamenhof-Festo, por la Abonhela Fonduso!




Se pezas la vivo sur viaj ŝultroj; se vespere, vi volas kviete ripozi kaj iomete pripensi vian situacion; se vi serĉas ŝancon por esti feliĉa ĉe dum malfacila vivo, la plej sukcesa libro de Phil Bosmans (iam tradukita en 14 lingvojn kaj eldonita en 4 milionoj da ekzempleroj!) helpos vin.

## ŜANCO POR FELIĈO

estas plenplena je pripensaĵoj, la tiel nomataj vitaminoj por la koro. Bele eldonita luksa libro kun multaj fotoj. Mendu ĝin ĉe via kutima libroservo aŭ rekte ĉe la distribuanto: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. Prezo: 390 Belgaj frankoj + afranko.






*Krys Ungar kaj Emile Van Damme, du novaj talentoj en la poezia firmamento, prezentas al vi faskon da poemoj pri hodiaŭaj temoj: jen humuraj, jen pensigaj, jen malgajaj. William Auld ne hezitis citi Ungar kaj Van Damme inter la plej elstaraj poetoj nunaj.*

*Krys Ungar: Meznokto metropola. 360 BEF + afranko.  
Emile Van Damme: Dolçe amare. 240 BEF + afranko*

*Mendu la librojn ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ ĉe via kutima libroservo.*



*Kompendio pri lingvistiko, en formo de vortaro kun difinoj.  
Nova metodo de gramatika analizado, sur ĉiuj niveloj, konforme al nova teorio.  
Nova kvantiga procedo, geometrie prezentbla.  
Nova distribuo de lingvistikaj branĉoj kaj konceptoj.  
Nova terminografio por lingva geneologio.  
Nova nomenklatur, esprimita per nova lingvaĵo: Universala Esperanto.*

*Formato A4 - 300 p. - 930 BEF + afranko - Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo.*

*Esperanto = Interlingvo?*

*JES!*

*Ĉar nun ekzistas la*

### **HUNGARA LINGVOKURSO**


*Enkonduko kaj kurso pri tiu finn-ugra lingvo, kun multaj klarigoj, tekstoj ekzercoj kaj plena vortlisto.*

*Mendu ĝin ĉe FEL (810 Belgaj frankoj + afranko) aŭ ĉe via kutima libroservo.*

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de **MONATO** en

## **praktika plasta kolektilo!**

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Prezo 360 BEF (inkl. afrankon). Se vi mendas 2 ekzemplerojn, vi ricevos trian senpage!